

PAIVA NETTO skribas "Homa maŝino kaj oleo de sento"

www.bonavolo.com

BONA VOLO



Edukado

DAŬRIPOVA SOCIO

Reeduki por transformi la planedon

Noviga propono de Legio de Bona Volo (LBV):

Formala kaj neformala Edukado kaj forigo de mizero cele al evoluigo de la nacioj

Kulturo de Paco: Valoroj de Ekumena Spiritualeco por formado de solidaraj civitanoj

Rakontoj pri sukceso: Rezultoj atingitaj de LBV en faveloj kaj en lernejoj de Brazilo kaj de pluraj landoj



LBV: Brazila organizaĵo kun statuso de ĝenerala konsultanto ĉe Ekosok, de Unuiĝintaj Nacioj, prezentas rekomendojn al aŭtoritatoj ĉeestantaj en la Kunsido de la Supera Instanco de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN, en la ĝeneva Palaco de la Nacioj, en Svislando, inter la tagoj 4a kaj 7a de julio 2011.



Pripensoj de BONA VOLO

Edukado estas ĉiam aktuala temo. Urgas, ke ni ĉiuj disvastigu kaj alfrontu ĝin kiel sekuran vojon, kiu mallongigas la socian distancon inter klasoj. Ĝi estas ankaŭ efika rimedo kontraŭ perforto, krimado, malsanoj kaj ĉio ajn, kio nuligas la sanan kreskadon de popolo.

Paiva Netto

Elprenaĵo de la libro *É urgente reeducar* [Urgas reeduki!], de la verkisto Paiva Netto, kiu superis la markon de 230 mil ekzempleroj venditaj.

4

MESAĜO DE PAIVA NETTO

Homa maŝino kaj oleo de sento

18

KONATIĜU KUN LBV

Por plibona mondo kaj pli feliĉa Homaro

28

REKOMENDOJ

Deklaro de LBV por la Kunsido de la Supera Instanco 2011j, de Ekosok

10

REGISTRO

Inter la plej efikaj en la mondo

Sociedukaj agadoj de LBV estas oficiale rekomendataj de UN dum Kunsido de la Supera Instanco de Ekosok, en Ĝenevo, Svisio.



34

OPINIO

Ensocietiĝo pere de bonkvalita instruado

Aŭtoras Sueli Periotto

39

HISTORIOJ DE SUKCESO

Superado

54

ATESTOJ

Edukado por nova mondo

En Brazilo, ĝenerala sekretario de UN ricevas ekumenan mesaĝon de LBV

La ĝenerala sekretario de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon**, unu- anime reelektita la 21an de junio por la plej grava posteno de UN, vizitis Brazilon kelkajn tagojn antaŭe (la 16an kaj 17an de junio), plenumante oficialan agendon en Latinameriko. Antaŭ ol reflugi, la diplomato ricevis de reprezentantoj de Legio de Bona Volo publikigaĵojn enhavantajn rekomendojn kaj bonajn praktikojn por la daŭripova evoluigo de la planedo, ellaboritajn surbaze de sperto de pli ol 60 jaroj da laboro fare de LBV.

Inter la donacitaj eldonaĵoj troviĝis la revuoj *Bona Volo Virino*, *Tutmondigo de la Frata Amo* (2a eldono), faldfolio pri la Templo de Bona Volo kaj du el plej lastaj deklaroj senditaj de LBV al UN — okaze de la Komisiono pri la Statuso de Virinoj, februare 2011, kaj la Kunsido de la Supera Instanco de Ekosok, julio 2010.

Tuj post la ricevo de la publikigaĵo, la diplomato atente trafolumis la revuon *Tutmondigo de la Frata Amo* kaj kunĝuis la entenon kun sia edzino **Yoo (Ban) Soon-taek**. Li krome reliefigis la nomon de la revuo kaj dankis la memoraĵon.



La ĝenerala sekretario de UN, Ban Ki-moon, akompane de sia edzino (dekstre) Yoo (Ban) Soon-taek, dum oficiala vizito al Brazilo.



Fotoj: José Gonçalves

KUNSIDO DE LA SUPERA INSTANCO (2007)

Reprezentantoj de LBV, de maldekstre: **Noys Rocha** (Portugalia), **Maria de Albuquerque** (Usono) kaj **Rosana Bertolin** (Brazilo), kun la revuo de LBV.



Eduarda Pereira

Meze, la ĝenerala sekretario de UN kaj, dekstre, s-ino **Hanifa Mezoui**, iama estrino de la Sekcio de NRO-j de UN/DESA. Ambaŭ aŭtoritatuloj ricevis la publikigaĵon de Legio de Bona Volo.

BONA VOLO

Edukado

Nepolitika kaj senpartia
revuo pri Ekumena Spiritualeco



BONA VOLO estas kvarmonata publikigaĵo de LBV, eldonita de Eldonejo Elevação. Ĝi estas registrita per n-ro 18166, sur la libro "B" de la 9-a Notario pri Registro de Biloj kaj Dokumentoj de San-Paŭlo, Brazilo.

DIREKTORO KAJ ĈEFELDONISTO: Francisco de Assis Periotto — MTE/DRTE/RJ 19.916 JP

ĜENERALAJ KUNORDIGANTOJ: Gerdeilson Botelho kaj Rodrigo de Oliveira

SUPERRIGARDO PRI MERKATIKO KAJ KOMUNIKADO: Gizelle Tonin de Almeida

SKIPO DE ELDONEJO ELEVACÃO: Adriane Schirmer, Alexandre Rueda, Allison Bello, Ana Paula de Oliveira, Andrea Leone, Angélica Periotto, Bettina Lopez, Cida Linares, Danielly Arruda, Felipe Duarte, Isabela Ribeiro, Jefferson Rodrigues, Jéssica Botelho, José Roberto Tenório da Silvia, Laura Leone, Leila Marco,

Letícia Rio, Luci Teixeira, Maria Aparecida da Silva, Maria de Albuquerque, Natália Lombardi, Neuza Alves, Paulo César Pereira, Paulo Sergio Viana, Raquel Bertolin, Rodrigo Gallo, Rosana Bertolin, Roseli Garcia, Silvana Bosso, Sílvia Bovino, Simone Barreto, Walter Periotto kaj Wanderly Albiéri Baptista.

KOVRILO: Helen Winkler

GRAFIKA PROJEKTO KAJ KOMPOSTADO: Diego Ciusz, Felipe Tonin kaj Helen Winkler

FOTO DE KOVRILO: Vivian R. Ferreira

PRESADO: Eldonejo Parma

ADRESO POR KORESPONDADO: Rua Doraci, 90 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brasil [Brazilo] • CEP 01134-050 • Tel.: (+55 11) 3225-4969 • www.bonavolo.com

La revuo BONA VOLO Edukado ne respondecas pri konceptoj kaj opinioj el la subskribitaj artikoloj.

Retaj kanaloj de LBV

www.bonavolo.com

Facebook: BonaVolo

Twitter: @BonaVolo

Youtube: PortalBonaVolo

esperanto@bonavolo.com

Homa maŝino kaj oleo de sento

Júlio Freida



José de Paiva Netto, verkisto, ĵurnalista, radiopreleganto, komponisto kaj poeto. Li naskiĝis je la 2-a de marto 1941, en Rio-de-Ĵaneiro/RJ, Brazilo. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV). Estas aktiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI), de Internacia, Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI-Inter), ano de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio-de-Ĵaneiro, de Sindikato de Radiokomunikantoj de Subŝtato Rio-de-Ĵaneiro, de Beletra Akademio en Centra Brazilo kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC).

Edukado estas ĉiam aktuala temo. Urĝas, ke ni ĉiuj disvastigu kaj alfrontu ĝin, kiel sekuran vojon, kiu mallongigas la socian distancon inter klasoj. Ĝi estas ankaŭ efika rimedo kontraŭ perforto, krimado, malsanoj kaj ĉio ajn, kio nuligas sanan kreskadon de popolo.

Responde al peto de amikoj, jen mi ĉi tie prezentas pecojn de prelego, kiun mi faris je la 9-a de marto 2010, en Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo, kun partopreno per

interreto de pluraj lokoj en Brazilo kaj eksterlande. Inter la traktitaj temoj, troviĝis la Pedagogio de Dio, kiun rekomendis **Alziro Zarur** (1914-1979),

kiun poste ni elvolvis al socieduka tezo de Legio de Bona Volo, celanta kunigi la kognan evoluadon de lernanto al kulturo de plurobla respekto; tial, ĉiam kun Ekumena Spiritualeco, kaj pri tio mi al



Alziro Zarur

Arquivo BV

Ĉi tie oni studas.

Oni formas Cerbon kaj Koron.

Penso de Paiva Netto, el la jardeko post 1970, montrata ĉe lernejoj de LBV en Brazilo kaj eksterlande, ekde la inaŭguro de Infanvartejo Jesuo, en San-Paŭlo/SP, Brazilo, je la 25-a de januaro 1986.



■ MESAÇO DE PAIVA NETTO



Vi parolas ofte. De tio rezultis responde Pedagogio de Amo, por infanoj, kaj tiu de Ekumena Civitano, por gejunuloj kaj plenkreskuloj.

Improvize, mi parolis pri tiu temo, dirante, ke ne sufiĉas kleriĝi pri raciaj homaj aferoj. Laŭ tio, kion mi emfazis en februaro 1984, kiam mi parolis al virinoj okupitaj pri agadoj de LBV, kaj poste per ĵurnalo *Folha de S.Paulo*, je la 27-a de julio 1986: Instruado, laŭ ni, estas tiu ricevata ĉe lernejo, ĉe kolegio, ĉe universitato aŭ ie ajn, kiun oni devas ligi al la hejmo, en formo de Edukado. Tia ligo estas nepre necesa. Sen Instruado kaj Edukado ne eblas progreso. Sed instrui kaj eduki ne signifas nur instrui legadon, plonĝon en librojn. Super ĉio, temas pri prilumado de inteligenteco por harmoniaj funkcioj de la Homo en socio. Cetere, socio kaj registaro devas konstante unuiĝi por starigi strukturon, kiu efektive formu ian pli bonan patrolandon, ian pli feliĉan mondon. Ju pli malbona la instruado, des pli malbona la estonteco. Do, instrui ne signifas nur transdoni abocon de surtera scienco, eĉ se plej altan Matematikon, Fizikon, Ĥemion, Astronomion, k.t.p.. Ĉar se ne troviĝas bona nutraĵo por la Animo — prilumata per spiritualigo, kiu signifas pli ol eduki, sed reeduki —, tiam tia radikalinstrua lernado kondukos la Homon, sen tia bona nutraĵo, al pensoj kaj agoj pli kaj pli detruaj. Eduki signifas transformi, reeduki, sub aŭspicioj de Paco, de Amo kaj de Justeco, vivigata per Bonkoreco kaj sekve ĝi signifas sublimigon de homa karaktero.

Sen Instruado, kaj precipe sen Edukado ne eblas morgaŭo. Ĉu vi memoras Planon Marshall, por Eŭropo, pri kiu mi jam parolis al vi plurfoje? Oni elstarigu Germanujon, en Okcidento, kaj Japanujon,

en Azio, kun **MacArthur** (1880-1964), kiuj vigle releviĝis. Tamen, la produktado de tiuj du landoj, kaj ankaŭ de multaj aliaj, bankrotus dum tiu periodo kaj dum iu ajn alia periodo, se oni ne preparus generacion, por kiu klerigado estis profunda, taŭga kiel fundamento al postaj generacioj.

Amo kaj Respekto

Oni multe plendas pri perforto ĉe lernejoj, sed se lernanto tien venas por lerni plivastigi sian rezonkapablon por fariĝi kapabla ensorbi la bezonatajn lecionojn laŭ teknika sciakiro, **paralele oni devas nepre konsideri plej taŭgan zorgon pri sentoj.**

Por infanoj, amo, kaj por junuloj, respekto similas funkciantan maŝinon: unuflanke la dentradoj, nome la menso, la logiko; aliflanke, la Animo, la sentemo, kiu evitas, ke ni fariĝu ĉiam pli sovaĝaj! Nu, la radodentoj sinsekve renkontiĝas kaj movas la maŝinon. Tamen, se Vi ne aldonas al tiu sistemo oleon de Frateco, de Solidareco, de Mizerikordo, de Kompatemo, ĉio paneas, blokiĝas, rustiĝas kaj fiaskas!

Precipa tasko

Ĉu Vi iam vidis bone funkciantan maŝinon, se ĝi ne estas taŭge oleita? Kio estas Homaro? Ĝi estas ia eksterordinara aparato, kiun oni devas olei per sento, kiu venas de Dio, se oni komprenas Lin kiel Amon, do Karitaton. Kaj ĉu vi scias, kiuj estas ĝiaj dentradoj? **Ni mem!**, kiuj ne estas iaj rustiĝemaj metalpecoj, krom se ni infektiĝis de senmoviganta nenifrado.

Jen estas nia precipa tasko: kleriĝi, edukiĝi, reedukiĝi, por efike instrui, eduki, reeduki.



Paulo Parisi



Kuritiba/Brazilo



Recifo/Brazilo



Bonaero/Argentino



San-Paŭlo/Brazilo

Nome, trafa Edukado liberigas. Kaj kun Ekumena Spiritualeco, ĝi sublimigas.

Vidu trans intelekto

En intervjuo, kiun mi donis al veterana itala ĵurnalisto, de longe loĝanta en Brazilo, **Paulo Rappoccio Parisi**, je la 10-a de oktobro 1981, mi diris, ke ĉe Legio de Bona Volo ni bataladas por Edukado kaj Klerigado ligitaj al lumiganta agado de Ekumena Spiritualeco.

Cetere, por sublime kunigi **lumojn de intelekto kaj Sunon de Spiritita Kono**, LBV pionire antaŭeniras por venigi en lernoĉambrojn — pro tio ni solidigas Pedagogion de Ekumena Civitano, aŭ Solidara Civitano,

kaj Pedagogion de Bonaj Sentoj, de Amo (por infanoj asistataj de LBV), ĉe ĝiaj instruorganoj — kapabligon pri etika



André Fernandes

▶ San-Paŭlo/Brazilo



Lucian Fagundes

▶ Rio-de-Janeiro/Brazilo



Débora Verdian

▶ Campina Grande/Brazilo




Afonso Oliveira

▶ Natalo /Brazilo

komprenpovo, cele al la Eterna Vivo, kaj same grave: apliki tion al konkretaj defioj de surtera vivo. Kiel ĉe kartezia geometrio, necesas, ke materia Edukado (ikso-koordinato aŭ koordinato de abs-cisoj) renkontu scion venintan el plej altaj sferoj de Dia Saĝo, nome el Amo (ipsilono-koordinato, aŭ koordinato de ordinatoj). Saĝulo komprenas kaj uzas inteligenton, intelekton, teknikan aŭ specifan konon profite al Homoj. Tamen, ekzistas tiom da tre inteligentaj homoj, kiuj fiagadas en ĉi tiu mondo. Ĉu estas saĝa tiu, kiu damaĝas sian similulon? Ne! Ni do akiru Saĝecon kun Jesuo, kiu estis Majstro en Israelo, kaj post centoj da jaroj unu el la plej respektataj profetoj en Islamo, lavis la piedojn de Siaj fratoj, laŭ raporto de Johano, en la 13-a ĉapitro de la kvara kanonika Evangelio. Salomono, en Sentencoj, 16:16, skribis: “Akiro de saĝeco estas

multe pli bona ol oro; kaj akiro de distingkapablo preferinda ol arĝento.”

Tiam ni iros laŭ ĝusta vojo, por prilumi la Spiriton per **Lumo, kiu ne estigas ombrojn: lumo de Dio**, se oni komprenas Lin kiel Amon, mi ripetas, neniam homforme, kion nepre kontraŭstaris **Albert Einstein** (1879-1955). Aŭ, por tiuj, kiuj ne kredas Lin, la lumo de noblaj sentoj, kiuj pravigas postvivadon de la homa raso, malgraŭ multaj jarcentoj da frenezo flanke de homoj, kiuj, larĝasence regis ĝin, ĉar ne nur loĝantoj en palacoj faras tion. (...) Ĉe la enirejo de Instituto pri Edukado de LBV, en la urbo San-Paŭlo, kaj ĉe ĝiaj lernejoj en Brazilo kaj eksterlande, oni legas klare: **Ĉi tie oni studas. Oni formas Cerbon kaj Koron.** Unu bezonas la alian.



Arkivo BV

Albert Einstein



Arkivo BV

Emmanuel

Skribis **Emmanuel**, en ĉapitro “Infanoj”, en sia verko *Vivanta Fonto*, psikografie skribita de **Francisco Cândido Xavier** (1910-2002), inspirete de la versiklo 10-a de la Evangelio de Jesuo, laŭ **Mateo**, ĉapitro 18-a: “*Gardu vin, ke vi ne malestimu unu el tiuj malgranduloj...*”:



Arkivo BV

Francisco Xavier

“Infanoj

Emmanuel

“*Kiam Jesuo rekomendis al ni, ke ni ne malestimu la malgrandulojn, Li celis, ke ni zorgu ne nur pri pano kaj vesto.*

“*Ne sufiĉas nutri etajn malsatantajn buŝojn aŭ vesti frostiĝintajn korpetojn. Nepre necesas morala ŝirmado, kiu*

garantiu al renaskiĝanta spirito taŭgan etoson por ties sublimado.

“Multaj gepatroj liveras materian komforton al siaj gefiloj, sed bedaŭrinde forlasas ilian animon.

“(…)

“Ne forlasu do infanon, fordonante ĝin al impulsoj de besteca naturo.

“(…)

“Telero da manĝaĵo estas grava por evolviĝado de homo, sed oni ne rajtas forgesi, ke ‘ne nur per pano la homo vivas’.

“Ni memoru pri nutrado de infanoj per niaj agoj kaj ekzemploj, admonoj kaj alĝustigoj, en oportuna tempo, ĉar morala neapogado de infano, je nuntempaj taskoj, estus kondamni ĝin al memmaltimo rilate ĝian estontan agadon”.

Koncerne tion, per dokumento, kiun ni sendis al UN, okaze de Konferenco pri Statuso de Virinoj, en marto 2009, mi asertis denove, ke **stabileco en la mondo komenciĝas ĉe infana koro**. Pro tio, en LBV, de multaj jaroj, ni uzas Pedagogion de Amo kaj Pedagogion de Ekumena Civitano. (...) La amo, kiu inspiras nian pedagogian vojon, se oni prenas ĝin laŭ plej alta senco, estas ne nur alta sento de Animo, sed **politika strategio**, same komprenata kiel plej alta inklino, konforme al Socia Justeco, kiel ia **strategio por postvivado** por individuoj, popoloj, nacioj. Homoj — do civitanoj, interalie esperplenaj gejunuloj — estas multe pli ol sako da karno, ostoj, muskoloj, nervoj, sango. Ili amas kaj suferas. Ili revas, deziras, konstruas, elreviĝas, kaj malgraŭ ĉio ili plu iradas, ili antaŭeniradas... Ili meritas, krom leĝoj, respekton, tiel ke leĝoj neniam konsistigu obskurajn privilegiojn, sed estu plenumataj favore al ĉiuj (...). ●



▶ Joinville/Brazilo



▶ Campo Grande/Brazilo



▶ Cuiabá/Brazilo



▶ Brazilja/Brazilo





Inter la plej efikaj en la mondo

Socieduka agado de LBV estas oficiale rekomendata de UN dum
Kunsido de la Supera Instanco de Ekosok, en Ĝenevo, Svisio.



En Ĝenevo, Svisio, aŭtoritatoj ricevas el reprezentantoj de LBV la specialan publikigaĵon de la Instituto por la evento: *BONA VOLO Edukado*. Inter ili (1) la ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, **Ban Ki-moon**; (2) **Nikhil Seth** (maldekstre), direktoro de la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN; kaj **Asha-Rose Migiro**, ĝenerala vicsekretariino de Unuiĝintaj Nacioj; kaj (3) **Irina Bokova**, ĝenerala direktorino de Unesko, kiu parolas al **Angélica Perotto**, de LBV, pri la nova pedagogia propono de la Instituto.



En la unua semajno de julio 2011, aŭtoritatoj el la tuta mondo venis al Ĝenevo, Svisio, por la Kunsido de la Supera Instanco de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok) de Unuiĝintaj Nacioj. La kerno de la debatoj estis la nuntempa scenejo pri Edukado, la celoj, la defioj kaj bonaj praktikoj transformantaj al plibona la realaĵon de multaj landoj.

La partopreno de Legio de Bona Volo en la evento, kiel en antaŭaj okazoj, pluan fojon honorigis la nomon de Brazilo ĉe UN. Krom diskonigi la rezultojn de sia socieduka laboro — kiu inkluzivas la Pedagogion de Amo kaj la Pedagogion de la Ekumena Civitano —, la

Instituto reprezentis la civilan socion en diversaj momentoj de la renkonto. Ĝi aparte montris al la internaciaj delegitaroj kaj tutmondaj reprezentantoj la bonajn praktikojn en la eduka kampo, disvolvitajn en Suda Ameriko, Usono kaj Portugalio.

Tuj en la unua tago de la kunsido, la 4an de julio, la partoprenantoj konatiĝis kun serio da rekomendoj ellaboritaj de LBV (vidu p. 28) kaj tradukitaj de UN al ties ses oficialaj lingvoj. La internaciaj delegitaroj ricevis ankaŭ specialan publikigaĵon, nome la revuon *BONA VOLO Edukado*, eldonitan angle, france, hispane kaj portugale.

Analizprezento de LBV montras, ke talento neniel koncernas al riĉeco aŭ malriĉeco kaj reliefigas la universalan aliron al bonkvalita edukado.



Adriana Rocha



Adriana Rocha

Dum la evento, LBV prezentis la Pedagogion de Amo kaj la Pedagogion de la Ekumena Civitano. De maldekstre: ambasadorino Maria Nazareth Farani Azevêdo, estrino de la Konstanta Misio de Brazilo ĉe UN en Ĝenevo; Danilo Parmegiani, peranto de la debatgrupo; d-ro Andrei Abramov, estro de la Sekcio de NRO-j de UN/Desa; kaj la pedagogiistino Sueli Periotto, superrigardanto de la pedagogia gvidlinio de LBV.

Reeduki por transformi

En 2011, la Institucio estis invitita partopreni en la oficiala programo de la evento per organizado de la analiz-prezento “Bonkvalita kaj egalrajta Edukado: intersektora defio por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn”. Kadre de tiu analizo, ĝi prezentis la prelegon “Plej bonkvalita Edukado superas mizeron: Kiel formi la plenecon civitanon cele al la Solidara Socio”.

La debatgrupo konsistis el la ambasadorino **Maria Nazareth Farani**

Azevêdo, estro de la Konstanta Misio de Brazilo ĉe UN en Ĝenevo; d-ro **Andrei Abramov**, estro de la Sekcio de NRO-j de la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN (UN/Desa); kaj la pedagogiistino **Sueli Periotto**, superrigardanto de la pedagogia gvidlinio de LBV, sukcese aplikata en la instrureto kaj en la sociasistaj programoj de la Institucio. Tiu eduka propono estis kreita de la edukanto **Paiva Netto** kaj konsistas el la Pedagogio de Amo kaj el la Pedagogio de la Ekumena Civitano.

Dum la debato, d-ro Andrei Abramov diris, ke “*Legio de Bona Volo okupas tre specialan lokon*” en la scenejo pri eduka evoluado kaj substrekis: “*Ne nur pro*



BONA VOLO Edukado, ellaborita por la renkonto de Ekosok kaj eldonita angle, france, hispane kaj portugale. La publikigaĵo enhavas novigajn proponojn por formala kaj neformala klerigadoj, cele al forigo de mizero kaj cele al evoluigo de la nacioj.



En la renkonto, **Elizabeth King**, direktorino pri Edukado de la Monda Banko, diris: “Ni restis kontentaj ke la parolo de LBV reprezentis la civilan socion”.

ĝia stabila historio koncerne Edukadon, sed ankaŭ pro la agado en aliaj fakoj. LBV aplikas sian holisman modelon en la faveloj, situantaj sur lokoj, kiuj eble registras plej altajn indicojn de perfortoj el inter la urboj de Brazilo. La Organizaĵo laboras partnere kun la registaro, lokaj aŭtoritatoj kaj aliaj NRO-j, kunigante kapabligajn programojn por infanoj kaj adoleskantoj kaj iliaj gepatroj en situacio de socia risko”.

Laŭ li, tiu trajto distingas la Institucion kaj kontribuas al la rompo de la neelirebla rezonrondo, kiu kondukas sinsekvajn generaciojn al rajtosenigo je bonkvalita lernado kaj konsekvence al sufero pro malriĉeco: “LBV inspiras la koron kaj menson de lernantoj kaj gepatroj por konsciigi kaj sentemigi ilin per edukado, kiel homa rajto, havigante al ili okazon por plibonigoj en ilia vivo, en ilia ekonomia kaj socia bonstato, kaj por praktiki civitanecon. Jen kio distingas Legion de Bona Volo disde aliaj institucioj”.



TV de UN dissendas oficialan deklaron de LBV al la mondo

La oficiala parolo de Legio de Bona Volo en la kunsidejo de UN okazis la 6an de julio. LBV troviĝis inter la neregistaraj organizoj, kiuj gajnis spacon por montri siajn sociedukajn agadojn. La deklaro estis samtempe tradukita al la ses oficialaj lingvoj de Unuiĝintaj Nacioj, kaj tial ĝi estis akompanata de la internaciaj delegitaroj. Temas pri interveno kiu restos registrita en la aktoj de la Konferenco kaj ankaŭ de la TV de UN — la registraĵo estas alirebla per la adreso www.unmultimedia.org aŭ per la ŝparligilo <http://t.co/coJsinB>.

Karen Westley (meze), internacia direktorino por sociaj investoj de Shell, akompane de reprezentantoj de LBV.



REGISTRO



Nurul Islam Nahid (meze), ministro pri Edukado en Bangladeŝo, kaj la ceteraj reprezentantoj de tiulanda delegitaro kune kun Danilo Parmegiani.



Jorge Sequeira, reprezentanto de Unesko por Latinameriko kaj Karibio, apud anoj de la skipo de LBV en la evento. Enmane, la revuo BONA VOLO *Edukado* en la hispana kaj franca.



Estis plezure partopreni en ĉi tiu evento organizata de Legio de Bona Volo. (...) Mi aŭdis kaj tre ŝatis koni plibone la Institucion, mi fariĝis admiranto kaj mi partoprenos. Jam estas aranĝite: mi iros al San-Paŭlo kaj vizitos vin, por fariĝi aganta kunlaboranto de LBV. Gratulon pro la laboro kiun vi faras!

Maria Nazareth Farani Azevêdo

Estrino de la Konstanta Misio de Brazilo ĉe UN en Ĝenevo

Reeĥoj

La propono de LBV estis vaste akceptita en la evento kaj vekis la intereson de aŭtoritatoj de la ŝtatoj-membroj de UN. *“Oni multe parolis pri Edukado laŭlonge de tiuj tagoj, sed estis LBV kiu venigis la respondon pri kio estas bonkvaliteco en Edukado”*, diris **Anke Bruns**, reprezentanto de Fondaĵo S.E.R. (Germanio kaj Svisio). Ankaŭ la kvartalestrino de Harlemo, en Novjorko, **Delois Blakely**, komentis: *“La modelo kiun LBV prezentis en Ĝenevo kaj mem uzas en siaj instruejoj estas la plej bona praktiko kiun bezonas Harlemo”*.

Cetere, tiu fama usona edukistino parolas bone informita: ŝi estas doktoro ĉe Universitato Kolumbio kaj magistro ĉe Harvard, krom esti modela lernantino en la renoma Instituto pri Teknologio de Massachusetts (MIT). *“Post analizo de la sistemoj kaj edukado, ni ŝatus adopti tiun praktikon de LBV kiel la plej bonan por la plenumo de la jarmila celaro rilate edukadon. (...) Tiu prezento, por mi, estis valora okazo. Ĝi neniel koncernas riĉecon aŭ malriĉecon; infano povas esti*

Legiana, Solidara Teamo en Ĝenevo. De maldekstre: Suelf Periotto, Noys Rocha, Adriana Rocha, Danilo Parmegiani, Pedro Augusto Periotto, Adalgiza Periotto, Rosana Bertolin, Angélica Periotto kaj la sviso Oliver Rizzi Carlson, simpaticanto de LBV.





Arkivo BV

De maldekstre: **Adriana Rocha**, de LBV; **Homero Hernández Sánchez**, ambasadoro de la Misiono de la Dominika Respubliko; **Carlos Robelo Raffone**, ambasadoro de la Nikaragva Misiono; kaj **Germán Munderaín Hernández**, ambasadoro de la Venezuelo Misiono.



Adriana Rocha

Joseph Deiss, prezidanto de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj, ricevas la revuon *BONA VOLO Edukado*, en la angla.

talenta eĉ apartenanta al malriĉa familio, kaj neniu povas forpreni de ĝi la rajton ricevi bonan edukadon”, diris d-rino Blakely.

Ankaŭ la reprezentantino de Fondaĵo S.E.R. akordiĝis kun la eduka propono de LBV. *“Tiu modelo kongruas kun tio kion mi kredas; nia laboro baziĝas sur edukado per repaciĝo kaj laŭ holisma maniero.”* Anke Bruns diris ke, malgraŭ ke ŝi partoprenis en multaj debatoj pritraktantaj la temon pri bonkvaliteco en edukado, laŭ ŝi, la demando ankoraŭ ne estis kontentige respondita. *“Sed en tiu prezento de LBV oni venigis respondon pri kio efektive tio signifas. Mi tre ŝatis”*, reliefigis ŝi.




Noys Rocha

Rosana Bertolin, de LBV, transdonas la hispanan eldonon de la revuo *BONA VOLO Edukado* al **Eduardo Aragundi**, vicministro pri Edukado de Argentino kaj subsekretario por Eduka Planado de la Ministraro pri Edukado en sia lando.



Arkivo BV

Radhika Padayachi, de la Departemento de la Ĝenerala Asembleo de UN, akompane de **Noys Rocha**, reprezentanto de LBV en la evento.



Arkivo BV

Martha Moreno, ministrino de la Konstanta Misiono de la Ambasadego de Paragvajo en Ĝenevo, ricevas de **Angélica Periotto**, de LBV, la hispanan eldonon de la revuo *BONA VOLO Edukado*.

LBV reprezentas la civilan socion en ministeria kunsido laŭ invito de Unesko, de ILO kaj de la Monda Banko



Juan Somavia, ĝenerala direktoro de la Internacia Labor-Organizo (ILO), parolas al Danilo Parmegiani pri la pedagogia propono de Legio de Bona Volo.



Parta vidaĵo de la ministeria kunsido, kiu traktis pri junularo kaj labormerkato, kun la ĉeesto de registaraj reprezentitoj kaj entreprenistoj. En la detalo, Danilo Parmegiani, de LBV.

La 5an de julio, en la ministeria kunsido realigata de la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Unesko), de la Internacia Labor-Organizo (ILO) kaj de la Monda Banko, Legio de Bona Volo pluan fojon reprezentis la civilan socion. La ĝenerala direktorino de Unesko, **Irina Bokova**, kaj la ĝenerala direktoro de ILO, **Juan Somavia**, gvidis la debaton kiu kunvenigis reprezentantojn de plej gravaj entreprenoj kaj internaciaj korporacioj.

Post aŭskulti la parolon de LBV, plede al valoroj de la Ekumena Spiritualeco por bonkvalita instruado, la direktorino pri Edukado de la Monda Banko kaj peranto de la dialogoj, **Elizabeth King**, dankis: *“Vi ne povas imagi kiel mi estis kontenta pasigi al vi la parolon”*.

Kortuŝita pro la mesaĝo kaj pro la historioj pri superado fare de favoratoj de la Institucio, tie raportitaj, la ĉilia ambasadoro **Pedro Ayarce Yuraszeck**, komentis: *“Ĉio kion ni aŭdis ĉi tie [en la evento] jam estis konata de ni, sed tio kion LBV portis estas la novaĵo, kiun ni devas enkonduki: valoroj en Edukado”*.

La rezulto de la partopreno de LBV en la Kunsido de la Supera Instanco de Ekosok, krom la internacia rekono pro la prezentitaj rekomendoj kaj bonaj praktikoj en Edukado, multaj estis la invitopetoj por ke la Institucio multobligu la entenon de la Pedagogio de Amo kaj de la Pedagogio de la Ekumena Civitano en la plej diversaj mondopartoj, tiel estigante novajn partnerecojn kiuj havigu tutmondajn disvolviĝojn sur la eduka kampo. ●

La dokumento kun la rekomendoj de LBV, tradukita de UN al ties ses oficialaj lingvoj. Por legi ĝin, vizitu la reton documents.un.org kaj entajpu la kodon: E/2011/NGO/34.



DELEGITAROJ RICEVAS MESAĜON DE LBV



1

Angélica Perillo




2

Arkivo BY



3

Angélica Perillo



4

Arkivo BY



5

Noys Rocha




6

Adriana Rocha



7

Noys Rocha



8

Angélica Perillo



9

Adriana Rocha

Reprezentantoj de LBV kaptas la okazon por paroli al delegitaroj el pluraj landoj, kiel (1) **Dato' Seri Shahrizat Abdul-Jalil** (maldekstre), ministrino de politikoj por la Virino, Familio kaj Socia Disvolviĝo en Malajzio; (2) **Sam K. Ogeri**, ministro pri Edukado en Kenjo; (3) egipta ambasadoro **Ahmed Gamal El-Din Moussa**; (4) ministro pri Edukado en Senegal (meze), **Kalidou Diallo**, kaj kunordiganto de la Ligo de Sinergiaj Organizaĵoj por Pledo de Publika Edukado (Cosydep), **Cheikh Mbow**; (5) **Essossimna Legzim-Balouki**, ministrino pri Baza kaj Duagrada Klerigadoj kaj pri Alfabetigo en Togolando; (6) d-rino **Asma Jahangir**, prezidanto de la Asocio de Advokatoj de la Supera Kortumo de Pakistano, omaĝita en 2010 per la Premio Unesko/Bilbao pro promocio de la kulturo de homaj rajtoj; (7) **Wendy Ramage Hawkins**, plenumdirektorino de Fondaĵo Intel; (8) d-ro **Abdulaziz Othman Altwaijri**, ĝenerala direktoro de la Islama Organizo por Edukado, Scienco kaj Kulturo (Isesco); kaj (9) prof-ro **Mamadou Diouf**, direktoro de la Instituto pri Afrikaj Studoj ĉe la Universitato Kolumbio (Usono).

Konu la pedagogian proponon de Legio de Bona Volo kaj sciu kiel estas sukcese aplikata la propra metodologio de LBV en la modelaj lernejoj kaj en la sociaj asistejoj de la Instituto. Por pliaj informoj vizitu la retejon www.bonavolo.com.

I KONATIĜU KUN LBV


La Instituto pri Edukado José de Paiva Netto, de LBV, en San-Paŭlo/SP, Brazilo, montras ke bonkvalita Edukado, Solidareco kaj la nemalhavebla Ekumena Spiritualeco estas la ŝlosiloj por sukceso de la Pedagogio de Amo kaj de Pedagogio de la Ekumena Civitano, ege rekomendataj de Paiva Netto. Sur la fasado de la Instituto, la ĉefgvidanto de la Institucio skribigis ĉi tiun maksimumon de **Aristotelo**:
“Ĉiuj kiuj pripensis la arton regi la homon fine konvinkigis, ke la sorto de imperioj dependas de edukado de la junularo”.



Por plibona mondo kaj pli feliĉa Homaro



LBV



**Urboj de
Brazilo**



Rio-de-
Janeiro/RJ



Natalo/RN



Recifo/PE



Brazilja/DF



Bel-
Horizonto/
MG



Belemo/PA



Kampino/SP



Joanpesoo/PB

De pli ol ses jardekoj, Legio de Bona Volo ĉeestas en pli ol 70 brazilaj urboj kaj havas memstarajn bazojn en aliaj ses landoj: Argentino, Bolivio, Paragvajo, Portugalio, Urugvajo kaj Usono, firmigante sin kiel unu el plej grandaj homamaj movadoj de la planedo.

LBV estas internacie rekonata pro sia laboro realigata en sociedukaj centroj kaj en kampanjoj por konsciigo kaj socia mobilizo, per la distingeco de Edukado kun Ekumena Spiritualeco, kiel la leganto konstatos en la sekvaj paĝoj.

Temas pri giganta kampanjo financata per donacoj de individuoj kaj intersekcijaj partneroj. Tio eblas danke al la kredindeco de la Instituto, konkerita pere de travidebla administrado kaj de pruvitaj rezultoj.

Usono



Arkivo BV

Portugaliao



Arkivo BV

Bolivio



Arkivo BV

Paragvajo



Arkivo BV

Brazilo



André Fernandes

Misio de LBV

Promocii Edukadon kaj Klerecon kun Ekumena Spiritualeco, por ke estu Nutrado, Sekureco, Sano kaj Laboro por ĉiuj en formado de la Planeda Civitano.

Argentino



Arkivo BV

Urugvajo



Arkivo BV

Maringá/PR



Arkivo BV

Cuiabá/MT



Jullison Nogueira



Instituto de Educação José de Paiva Netto São Paulo/SP

I KONATIĜU KUN LBV

Socia bilanco*

Signifa nombro da sociedukaj asistoj realigitaj de Legio de Bona Volo en la lastaj kvin jaroj:



*La ĝenerala bilanco de Legio de Bona Volo estas kontrolita de Walter Heuer (eksteraj sendependaj kontrolantoj), laŭ iniciato de José de Paiva Netto, direktoro-prezidanto de LBV, de tempo pli fruaj al la leĝaro postulanta tiun kontrolon.

** Asistoj kaj bonhavaĵoj

Nur en 2010 registriĝis pli ol 8,5 milionoj da asistoj kaj bonhavaĵoj liveritaj al familioj en situacio de socia vundebleco en Brazilo. Tiu inklino servi kaj indigi la Vivon manifestiĝas en ĉiu historio pri superado de flegataj infanoj, adoleskantoj, junuloj, plenaĝuloj kaj maljunuloj.

Devontigo al Edukado

Ekde sia fondiĝo, en la Tago de Universala Kunfratiĝo (1/01/1950), fare de la poeto kaj radipreleganto **Alziro Zarur** (1914-1979), en la urbo Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, LBV plivastigas la aliron de siaj pro-

gramoj pri kompleta apogo al la Homo kaj plifortigas la agadon favore al la daŭripova evoluigo de la nacioj.

Preninte sur sin prezidantecon de la Institucio, en 1979, la ĵurnalisto kaj verkisto **José de Paiva Netto** plivastigis tiun mision per inaŭguro de modelaj lernejoj kaj Komunumaj Centroj de Sociala Asistado — reto kiu ĉiutage servas al miloj da infanoj, junuloj, plenaĝuloj kaj maljunuloj trafitaj de socia kaj/aŭ persona vundebleco, inkluzivante lernantojn de la publika reto da lernejoj.

Tiuj lokoj utilas kiel bazo por la disvolvado de eduka projekto eĉ pli granda: la Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de Ekumena Civitano (legu sur p. 34). Tiamaniere, LBV proponas la adopton de instruplatformo kiu ne limiĝas al la lerneja programo, ĉar ĝi instigas novtipan konsciigon de civitaneco kun



Vinicius Bueno



Ipatinga/MG



San-Paŭlo/SP



Salvadoro/BA



Cachoeiro de Itapemirim/ES

Clayton Ferreira

Elisângela Spinola

School Picture

sinsekvo en la ceteraj sferoj de la socio. Kiel difinas Paiva Netto, kreinto de tiu pedagogia gvidlinio: *“Edukado estas ĉiam aktuala temo. Urgas, ke ni ĉiuj disvastigu kaj alfrontu ĝin kiel sekuran vojon, kiu mallongigas la socian distancon inter klasoj. Ĝi estas ankaŭ efika rimedo kontraŭ perforto, krimado, malsanoj kaj ĉio ajn, kio nuligas la sanan kreskadon de popolo”*.

La marko de bonegeco de tiu eduka propono vekas la atenton de enlandaj kaj alilandaj edukistoj. Tia rekono rezultigis en invitoj por ke LBV kapabligu instruistojn kaj preparu materialon por pluraj edukejoj interesataj adopti ĝian pedagogian gvidlinion, kiu ĉeestas ankaŭ en kongresoj pri Edukado, krom atingi milionojn da hejmoj per radia kaj televida programoj, retejoj kaj publikigaĵoj.

Urboj de Brazilo



Mogi das Cruzes/SP



Foz do Iguaçu/PR



Londrina/PR



Anápolis/GO



Kuritiba/PR



Diego Basso



Nova Friburgo/RJ



Ponta Grossa/PR



Cabo Frio/RJ



Nia laboro

La sociedukaj centroj de LBV konsistas el lernejoj, ŝirmejoj por maljunuloj kaj Komunumaj Centroj de Sociala Asistado.

La agadoj, bazitaj sur la sento de Solidareco, ankaŭ celas la moralan kaj spiritan reedukadon, tio estas, la vekigon de fratecaj valoroj en la favorato por ke li konscie praktiku civitanecon kaj etikon en la familio kaj en la socio.

Lernejoj

Ili havas la mision eduki kun Ekumena Spiritualeco, formante “*Cerbon kaj Koron*”. Ilia celo estas antaŭenigi ĉe la diversaj aĝogrupoj, kun kvalito, kompetenteco kaj efektiveco, la harmonian disvolviĝon de la inteligenteco de la korpo kaj de la Spirito. La aktivecoj okazas ekde la formala kleriĝado kaj etendiĝas al ĉiuj ŝtupoj de la baza lernejo.

- Infana edukado
- Baza lernejo
- Mezgrada lernejo
- Edukado de Junuloj kaj Plenaĝuloj (EJA, portugale)

Ŝirmejoj por maljunuloj

Temas pri loĝejoj por maljunuloj sen sociaj rilatoj kaj/aŭ apartigitaj de sia familia rondo. Ili celas, per aktivecoj fizikaj, sociaj kaj distraj, reestigi la familiajn rilatojn kaj kunlabori por ke la favoratoj ĝuu vivon digne, societeman kaj sanan.

Komunumaj Centroj de Sociala Asistado

En tiuj lokoj disvolviĝas sociasistaj programoj, pere de kiuj oni ofertas asiston individuan kaj familian, kaj tial kontribuas por la disvolvo de kapablecoj, talentoj kaj valoroj; por ke la partoprenantoj konsciigu pri siaj rajtoj kaj devoj, plibonigu sian memestimon kaj praktiku civitanecon.

Sociedukaj programoj

- *Civitano-Bebo*

Ĝi ŝirmas gravedulinojn kaj virinojn kun infanoj ĝis unu-jariĝo. Kontribuas al la gravedo-procezo kaj al la familia disvolvo pere de sociala kaj psikologia asistado, jura servo, prelegoj kaj terapioj.

• **LBV — Infano: Estonteco en la Estanteco!**

Ĝi kontribuas al la protagonismo de infanoj 6-jaraj ĝis 12-jaraj, pere de aktivecoj kiuj vekas kompetentecojn kaj lertecojn, instigas travivon de valoroj kaj kunigas la familion. Inkludas metiejojn pri arto, Ekumenan Kulturon, sportojn, muzikon, ciferecan inkluzivigon, pedagogian kaj psikologian apogon kaj ludotekon. La infano restas en LBV en horaro inversa al tiu de la lernejo.



• **Kapabligo kaj Produktema Inkluzivigo**

Ĝi pretigas junulojn kaj plenaĝulojn por la labormerkato pere de kursoj celantaj la disvolvon de kapabloj kaj lertecoj teknikaj kaj personaj.



• **Spaco por Kunvivado**

Ĝi kunlaboras al la socikultura integriĝo kaj plifortigo de civitaneco de junuloj, plenaĝuloj kaj maljunuloj. Provizas favoran medion por estigo de rilatoj interpersonaj, intergeneraciaj kaj familiaj pere de grupaj aktivadoj, sportaj eventoj, terapioj ktp.



Kampanjoj

La sinsekvaj kampanjoj por socia mobilizo kaj konsciigo, kiujn Legio de Bona Volo okazigas en la tuta Brazilo, celas la valorigon de la Vivo kun speciala atento al la infano kaj al la familio. En tiaj iniciatoj okazas aktivecoj komplementaj al la tuta disvolvo de la favoratoj, inter kiuj la livero de lerneja materialo kaj provizo de nepereemaj nutraĵoj.

• **Infano Noto 10 — Sen Edukado ne estas Estonteco!**

Ĝi ekonomie favorigas gepatrojn, kiuj estas en malbona financa situacio, pere de livero de pli ol 12 mil pakaĵoj da lerneja materialo, krom stimuli plibonigon de memestimo de infanoj kaj adoleskantoj, kiuj vizitas la bazajn lernejojn de la Instituto, kaj de partoprenantoj en la programo *LBV — Infano: Estonteco en la Estanteco!*



• **Konstanta Kristnasko de LBV — Jesuo, Nia Ĉiutaga Pano!**

Ĝi liveras provizojn da nepereemaj nutraĵoj al la familioj favorigataj de la socia-sistaj programoj de LBV, laŭlonge de la jaro, al tiuj servataj de grupoj partoprenantaj en la Reto Solidara Socio, kaj al tiuj helpataj de organizoj partneraj de la Instituto.



• **SOS Katastrofoj**

Kampanjo realigata partnere kun diversaj organizoj kaj apoge de centoj da volontuloj. Ĝi entreprenas rapidajn kaj urĝajn agadojn por helpi personojn kaj/aŭ komunumojn trafitajn de katastrofoj. Ĝi distribuas nepereemajn nutraĵojn kaj urĝajn necesojn (vestojn, ŝuojn, hejmajn ilojn, vindaĵojn, trinkeblan akvon, materialon por purigado kaj persona higieno k.a.), krom havigi aliajn servojn.



Kunsidejo de
la Ĝenerala
Asembleo de
Unuiĝintaj
Nacioj



Arivo BV

LBV en UN

Konu la Oficejon de
Reprezentiĝo de LBV
por Unuiĝintaj Nacioj, en
Manhatano ĉe 36 W 44th
Street Mezzanine (inter
la 5a kaj 6a avenuoj),
Novjorko, 10036.
Telefona: (+1646) 398-
7128.

Por efektiviĝi programojn kaj projektojn cele al ensocietigo kaj daŭripova evoluigo, LBV tenas partnerecon kun la ĉefaj sektoroj de la socio (registro, entreprenoj socimedie engaĝitaj, internaciaj organoj, lernejoj, komunumaj asocioj kaj aliaj organizoj de la civila socio). Celkongrue, al agentoj de tiaspeca iniciato nepras kunlaboremo kaj devontigo kun spontana sento de Amo al la proksimulo.

Legio de Bona Volo estis la unua brazila organizo de la civila socio aniĝi al la Departemento de Publika Informado (DPI), organo de Unuiĝintaj Nacioj (UN), ekde 1994. En 1999, ĝi fariĝis ankaŭ la unua brazila civila asocio akiri ĉe UN la ĝeneralan konsultan statuson en ties Ekonomia kaj Socia Konsilantaro (Ekosok), sub unuanima voĉdonado de reprezentantoj el 28 landoj. LBV konkeris la rajton partopreni en la konferencoj de ĉiuj fakoj de UN, kun aganta voĉo rilate rekomendo-

jn pri internaciaj publikaj politikoj. La sekvan jaron, ĝi membriĝis al la Konferenco de NRO-j kun Konsultaj Rilatoj por Unuiĝintaj Nacioj (Congo), kun sidejo en Vieno, Aŭstrio.

En 2004 ĝi kunfondis, en Unuiĝintaj Nacioj, la Komitaton de NRO-j pri Spiritualeco, Valoroj kaj Tutmondaj Intereso, en kies plenumdecida kerno ĝi agadas nuntempe.

En 2010, Legio de Bona Volo de Usono (Legion of Good Will — LGW) inaŭguris novan oficejon de reprezentiĝo en Novjorko. Per tiu agado, LBV plifortigas la voĉon de la latinamerika civila socio en la temo-diskutoj de UN, speciale en Ekosok. Krom tiu reprezentiĝo, la oficejo havas kiel celon mobilizi la novjorkajn civitanojn kaj membrojn de la internacia komunumo al la volontulado en la sociedukaj programoj kaj projektoj, sekve al la modelo kiun la Institucio entreprenas en aliaj kvin landoj, kie funkcias ĝiaj memstaraj bazoj, kaj en Brazilo. ●




Vinicius Bueno

INVITO AL EDUKISTOJ

**Ĉu vi volas
venigi tiun bonan
ideon en
vian
lernocambron?**



LBV



Ricevu la kapabligon pri la Pedagogio de Bona Volo (Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de la Ekumena Civitano), kreita de la edukanto Paiva Netto, en Brazilo kaj alilande.

“Trafa Edukado liberigas. Kaj kun Ekumena Spiritualeco, ĝi sublimigas.”

Paiva Netto

Deklaro de LBV por la Kunsido de la Supera Instanco 2011j, de Ekosok

Sekvas elpreno de la deklaro de Legio de Bona Volo (LBV) sendita al Unuiĝintaj Nacioj celanta la Kunsidon de la Supera Instanco de la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de UN (Ekosok), en 2011j, kies tagordo estas Edukado. La rekomendoj estis frukto de la sperto de pli ol ses jardekoj de LBV en tiu fako kaj de la rezulto de vastaj streboj por socia mobilizo organizitaj de la Institucio pere de la 8a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 5a Foiro pri Novigoj, dum kiu okazis 13 eventoj, de la 22a de junio 2010 ĝis la 1a de aprilo 2011, en Sudameriko kaj en Eŭropo.

Rio-de-Ĵaneiro lerneja masakro

Ĉi tiu raporto estis preparita sub la emocia efekto de la tragedio de la 7a de aprilo 2011, kiam 12 infanoj estis viktimoj de masakro en publika lernejo, kie ili studis en la urbo Rio-de-Ĵaneiro. Kiel en similaj okazoj registritaj en la mondo, la murdinto jam studis en la sama lernejo, prezentis mensajn pertur-



André Fernandes

bojn kaj, infanaĝe, suferis ĉikanadon. La fakto ke tiuj individuoj kreskas, sen ke tiaj misfunkcioj estas frue malkaŝitaj kaj kuracataj, meritas la konsideron de la tuta socio.

Tial, LBV okazigas diskutojn pri edukado kun tiu diferencigo, nome “rigardo trans la intelekto”, diskonigata de la edukanto Paiva Netto. Per zorgo, kiu transiras la lernoprogramajn



entenojn, LBV konsideras la valorojn kaj la subjektivecon de ĉiu edukato, prilaboritaj surbaze de pedagogia propono, kiu kunigas al la intelekta disvolviĝo ian perspektivon pri Ekumena Spiritualeco, celantan Kulturon de Paco. El tio, la aserto de la ĉefgvidanto de LBV, kiu resumas tiun tutan laboron: *“Ĉi tie oni studas. Oni formas Cerbon kaj Koron”*.

En Legio de Bona Volo,
Ekumena Spiritualeco
celas Kulturon de Paco.



▼
Homamaso antaŭ la Municipa Lernejo Tasso da Silveira, post la tragedio.

Tiu nova rigardo plivastigas la sencon pri civitaneco kaj renovigas la esperon pri tio ke fatalaĵoj kiel tiu masakro en Rio-de-Ĵanejro neniam ripetiĝu. Kaj plie: per ĝi eblas multobligi la pozitivan efekton de sennombraj atestoj pri superado, kio montras la eblecon pri kompleta formado de individuoj cele al solidara socio.

Edukado en konfliktantaj loko

Okaze de la plej granda movado por publika sekureco en la lastatempa brazila historio, la registaro de Rio-de-Ĵanejro, partnere kun aliaj publikaj sektoroj, estas kreinta en la faveloj de Rio la Erojn de Paciga Polico (portugale, UPPs). En lokoj antaŭe sub la regado de narkoŝakristoj kaj de sekretaj milicoj, la registaro komencis oferti bazajn publikajn servojn, kompletigitajn per la nepra agado de organizaĵoj de la civila socio, kiel LBV. Tiamaniere, laŭgrade aliĝas la kondiĉoj de marĝeniĝo, kiu favorigis krimadon.

La ekzemplo de la knabino Maria (fikcia nomo cele al protekto de identeco), 12-jaraĝa, estas simbola. Loĝanto en Providência, konflikta loko en Rio, Maria havis fraton allogitan de la narkoŝakrado, kiu mortis en batalo kun la polico dum okupacio en la komunumo. La familia tragedio kreskigis en ŝi la timon sperti la saman destinon. Post la okupacio, la policistoj komencis krei fido-rilatojn en la komunumo helpe de specifa trejnado kaj apogo de partneraj organizaĵoj.

La knabino kaj ŝia familio nun vivas novan realaĵon. Nuntempe ŝi ĉeestas lecionon pri karateo okazanta en UPP-Providência kaj estas medalgajninto en konkursoj de tiu sporto. Tiaj konkuroj montras eĉ pligrandan transformon, estigitan de la projekto apogata de LBV. Laŭ raportoj de la multfaka teamo de la Institucio, la fokusigo al ŝia emocia disvolviĝo helpis la infanon superi la traŭmon. La koleremo kaj timo cedis lokon al simpatio kaj espero, esprimitaj en renovigita kaj harmonia kunvivado.

Ŝia historio memorigas pri tiu de multaj aliaj infanoj kaj adoleskantoj de la komunumo kaj evidencigas la sukceson de la metodologio, kiu povas esti aplikata tra la mondo, ĉefe en konfliktantaj lokoj.

Rekomendoj

El la rekomendoj kolektitaj, ankaŭ pere de vasta esploro, reliefiĝas:

— plibonigi la uzon de teknologioj pri informado kaj komunikado en la lernado, kun partopreno de edukistoj, gepatroj kaj familianoj pere de programoj por formado, kaj ankaŭ per efektiviĝo de interfakaj projektoj celantaj la uzadon de tiaj iloj por agadoj favorigantaj la komunumojn;



Providência Monteto

Komunumo Providência[sorto],
centra regiono de Rio-de-
Janeiro/RJ, Brazilo.



— kunligi diversajn sociajn agantojn (ekzemple de entreprenoj, universitatoj kaj organizaĵoj de la civila socio) per interligitaj strategioj por plibonigi instruadon, starigante novajn, edukajn kaj komunumajn lokojn.

— plifortigi la laboron de instruistoj per speciala atento, en universitataj kursoj, al lernobjektoj celantaj la praktikon de la instruisto kun adopto de programoj por daŭra formado kaj de stimuloj por ke la kariero de la instruisto fariĝu pli alloga;

— kapabligi kaj havigi rimedojn al instruistoj por ke li prilaboru diversecon, inkluzive de infanoj handikapitaj aŭ kun misfunkcioj por lernado. Pli grandan atenton ankaŭ al la temoj celantaj la diskonigon de socia justeco kaj daŭripova evoluigo;

— okazigi agadojn por enkonduko kaj

disvolvo de plurlingveco en la latinamerikaj landoj, ekde la kursoj por formado de instruistoj, cele al kulturo-protektado de la originaj popoloj;

— krei kaj plifortigi mekanismojn, per kiuj administrado de lernejoj fariĝu pli malcentra helpe de efektiva partopreno de patraj konsilantaroj kaj membroj de la komunumo;

— enkonduki administrajn plibonigojn en la lernejojn kaj edukajn retojn kun ŝparprogramo kaj liberigo de profesiuloj, en la pedagogia fako, el burokrataj kaj administrataj procedoj;

— krei laŭleĝajn efikajn mekanismojn de kunlaboro inter la publika administrantaro kaj komunumaj lernejoj, kun konsidero al iliaj specifecoj;

— inviti al tutmonda diskuto pri la kriterioj por taksado de lernantoj kun konsidero al la kulturaj apartaĵoj de

Per starigo de la Eroj de Paciga Polico [UPP, portugale] de Providência (centra regiono de Rio-de-Janeiro/RJ) kaj de karateo-kurso en la komunumo, en 2010, LBV pliampleksigis la agojn, kiuj ĝi plenumadas surloke.

Ĝi eĉ ekfaciligis la kurson per sia eduka metodologio kaj sindediĉe sin donis al la ideo. La Institucio partenerere kun Supera Radio Brazilo kaj Regado de Subŝtato Rio-de-Janeiro [pere de la Sekretariejoj pri Publika Sekureco, pri Socia Asistado kaj Homaj Rajtoj kaj pri Sporto kaj Libertempaj Aktivecoj, kun apogo de la Subŝtata Superrigardo pri Sportoj (Suderj, portugule)], ebligis ke la junaj atletoj partoprenis sportajn konkursojn.

REKOMENDOJ

Vizitu, entuziasmiĝu kaj helpu al LBV! En Rio-de-Ĵanejro/RJ, Brazilo, la Eduka Centro José de Paiva Netto situas ĉe Av. Dom Hélder Câmara, 3.059 — Del Castilho. Por pliaj informoj, skribu al esperanto@bonavolo.com



Fotoj: Vivian R. Ferreira




ĉiu lando kaj al la postuloj de la nova ekonomio.

LBV dankas ĉiujn partnerojn, speciale pro la subteno kaj partopreno de diversaj organoj de la UN-sistemo en Latinameriko, kaj s-ron **Andrei Abramov**, Sekciestro de NRO-j de la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiu, ĉeestinte la eventojn kiel preleganto, ŝlosile rolis en la ĉefaj konferencoj, havigante netakseblajn pripensojn kaj orientadojn laŭlonge de la tuta proceso.

La Institucio pretas kunlabori kun la ŝtatoj-membroj de UN kaj organizaĵoj

de la civila socio laborantaj por plifortigo de Edukado tutmonde. Ĝi ankaŭ ripetas sian avangardan defendon pri tio ke la sociaj transformiĝoj pli profundaj kaj longdaŭraj komenciĝas per Edukado.

Laŭ la vortoj de la ĉefgvidanto de LBV: *“Popolo edukita, klerigita kaj ekumene spiritualigita estas popolo kiu rompas la katenojn de mizero kaj ilin forjetas. (...) Ĝis tiu efika instruado dezirata de ĉiuj prudentuloj ne regos, iu ajn nacio tenos sin katenita per tiuj limigoj, kiujn ili altrudis al si mem”.*



.....
**La plibona
mondo povas
komenciĝi
per unu
sola gesto**
.....

Plenumu
vian parton!

Sciu kie troviĝas LBV-on

CENTRA SIDEJO: Rua Sérgio Tomás, 740 • Bom Retiro • São Paulo/SP • Brazilo
• CEP 01131-010 • Tel.: (+5511) 3225-4500 • www.lbv.org • www.bonavolo.com
• **LBV DE ARGENTINO:** Calle José Mármol 964 • Boedo • Buenos Aires • CPA
C1236ABL • Tel.: (+5411) 4925-5000 • www.lbv.org.ar • **LBV DE BOLIVIO:** Calle
Asunta Bozo Bistrot 520 • Zona Alto Obrajes (sector A) • La Paz • Casilla de
Correo 5951 • Tel.: (+5912) 273-3759 • www.lbv.org.bo • **LBV DE USONO:** 36 W
44th Street Mezzanine • Manhattan • New York • 10036 • Tel.: (+1646) 398-7128
• www.legionofgoodwill.org • **LBV DE PARAGVAJO:** Calle Curupayty, 1452 • Barrio
Villa Cerro Corá • Ciudad de Lambaré • Tel.: (+59521) 921-100/3 • www.lbv.org.py
• **LBV DE PORTUGALIO:** Comandante Rodolfo de Araújo, 104 • Bonfim • Porto
• CP 4000-414 • Tel.: (+35122) 208-6494 • www.lbv.pt • **LBV DE URUGVAJO:** Av.
Agraciada 2328 • Aguada • Montevideo • CP 11800 • Tel.: (+5982) 924-2790 •
www.lbv.org.uy



Helpu! www.legionofgoodwill.org

Banko Santander: Bankokodo: 0239 • Kontnumero: 13002754-6

Banko HSBC: Bankokodo: 0343 • Kontnumero: 63275-24

Ensocietiĝo pere de bonkvalita instruado

“la rigardo trans la intelekto”, kiel preskribas la
ĉefgvidanto de LBV.



Sueli Periotto

Sueli Periotto*¹, super-
rigardantino de la
Pedagogio de Bona
Volo (Pedagogio de
Amo kaj Pedagogio de
la Ekumena Civitano),
direktorino de la Instituto
pri Edukado de LBV.

Alidirate, ĉiu persono havas iajn kulturajn akiritaĵojn, kio distingas pli rimarkinde liajn lertecojn kaj kapablecojn.

Rilate la Pedagogion de LBV, la peranta aktivado de la edukisto, interage kun la lernantoj ĉe la plivastigo de klereco, estas fundamenta por la lernado de *ambaŭ*; kiel kunaŭtoroj, ili dividas inter si sciojn, distinge agante laŭ interaga procedo.

Per tiu eduka praktiko Paiva Netto montras la vojon de la Ekumena Spiritualeco, kies rolo estas venigi pli da lumo sur la aspektojn kulturajn, sociajn kaj intelektajn de la sciaro. Por ebligi la *solidaran konon* — entuto de la kona potencialo kun etikaj, ekumenaj kaj spiritalaj valoroj — la Pedagogio de LBV konsideras la Homon laŭ ties pleneco, *spirito-biopsikosocia* Estulo.

*¹ Sueli Periotto estas pedagogiistino postdiplomita pri Lerneja Administrado kaj Metodologio de la Humanaj Sciencoj kaj magistriĝanta pri Edukado ĉe PUC-SP, konferencisto kaj prezentistino de la programo *Edukado sub Debato*, de Superreto Bona Volo de Radio (sekvu la programon per la Portalo www.bonavolo.com).

Legio de Bona Volo ĉiam zorgis diskonigi Edukadon kiu *nutras Cerbon kaj Koron*, kiel difinas la kreinto de la pedagogia propono de LBV, la edukanto Paiva Netto. Per la Pedagogio de Amo (celanta infanojn ĝis 10 jaroj) kaj la Pedagogio de la Ekumena Civitano (celanta individuojn pli aĝajn ol 11 jaroj), li montras ke la eblecoj por evoluo de la edukato estiĝas ankaŭ *el interne eksteren*.



Parta vidaĵo de Supervartejo Jesuo; flanke situas la Instituto pri Edukado José de Paiva Netto. La du konstruaĵoj konsistigas la Edukan Ensemblon de LBV, en la subŝtata ĉefurbo San-Paŭlo, kiu ĉiutage gastigas 1.200 lernantojn, de bebovartejo ĝis mezgrada lernejo, kun bonkvaliteco. Sur la fasado de la Supervartejo, legeblas la penso de la karmemora fondinto de la Instituto, Alziro Zarur (1914-1979): *“La filoj estas filoj de ĉiuj patrinoj, kaj la patrinoj estas patrinoj de ĉiuj filoj”*.



KIO ESTAS SPIRITO-BIOPSIKOSOCIA ESTULO?

En la sociedukaj centroj de LBV la lernanto estas konsiderata spirito-biopsikosocia Estulo, ĉar li portas kun si la registron de travivaĵoj, kiuj kontribuos al lia lernado.

“Spirito”

La Pedagogio de Bona Volo valorigas tion kio estas en la interno, la aspektojn de la subjektiveco, kiuj entenas la registron de antaŭaj travivaĵoj; finfine, la edukato ne estas ia *glatigita tabulo**². Ĝi ankaŭ stimulas la sentojn kaj plifirmigas valorojn kiel Ekumena Solidareco, Amikeco kaj Partnereco, empatie uzataj.



“Psiko”

La **emociaj** problemoj estas rigardataj de la multifaka teamo de la edukaj fakoj de LBV, speciale de psikologiistoj. Kiam necese, la edukato estas protektata koncerne la aspektojn de sendefendeco estigitajn de ruinigaj situacioj, ordinaraj en medio de socia vundebleco al kiu multaj familioj submetiĝas. La malfacileco por lernado kaj la perturboj kaj teniĝoj postulantaj helpon de profesiulo de la psikologia fako, kiel la kazoj de agresemo, izoleco kaj apatio, estas atente observataj.

Propra metodologio

Konsidere al tiu kompleta Estulo, Legio de Bona Volo kreis propran metodologion por sia eduka sistemo: Lernmetodo per Esploro Racia, Emocia kaj Intuicia (MAPREI), kun speciala atento al **esploro** kaj **intuicio**. La metodo konsistas el ses etapoj, en kiuj la lernanto estas la protagonisto de la eduka scenejo, kaj havas la edukiston kiel fundamentan elementon en la pro-

ceso de konstruo de la kono, kaj ankaŭ samtempe kuraĝigas la lernanton sekvi la studojn kaj aliri la akademian vivon. La edukato havas voĉon; li estas esplorado kiu uzas intuicion kaj sin esprimas (skribe kaj parole) sen hezitemo kaj timemo, tipoj de teniĝo ordinaraj ligitaj al malforta memestimo.

La metodo de LBV investas en *bonkvalitan lernadon cele promocii ensocietiĝon*, ĉar ĝi havigas rimedojn

*²*Tabula rasa* [Glatigita tabulo] — Empirisme (filozofia skolo defendanta kiel unika origino de scio la sperton, tion akireblan el la ekstera mondo), *tabula rasa* (latina esprimo) estas kondiĉo, kiu karakterizas malplenan menson, antaŭanta iun ajn konon akiritan pere de la sentumoj.



“Socia”

Ĉe LBV oni elstarigas la praktikon de komunuma laboro inter la lernejo kaj la familio. Estas esenca la organiza partopreno de la gepatroj en la lerneja vivo de la gefiloj. Kiam la lernejo konas la sociekonomian realaĵon de la familio, eblas kontribui al la plifortigo de sentaj alligitecoj. La familio bezonas akceptemon, kuraĝigon kaj orientadon por ke ĝi strebu superi la malfacilaĵojn, identigu kaj plibonigu siajn lertecojn. Pere de ekzercado de valoroj prilimitaj de la Ekumena Spiritualeco, oni promocias la Kulturon de Paco en la lernejoj de LBV, kie cetere la *indico de antaŭtempa forlaso de lernejo estas nulo*.



“Bio” (biologia)

Inkluzivas la zorgojn de kuracistoj, dentistoj kaj nutristoj. La fizika sano estas planita kiel preventa maniero, aldone de orientado kaj informoj al la familioj pere de prelegoj, diversaj faldfolioj kaj san-programoj ilin favorigantaj. La bonstato de la korpo estas esenca por la bona disvolvo de la eduka proceso.



al la lernantoj por ke ili plibone sin preparu por la labormerkato. Surbaze de indicoj montrantaj signifan kreskon en la nombro de universitataj diplomitiĝantoj, oni povas havi la impreson pri tio ke diplomo de supera edukado reprezentas eble la unikan pasporton al la plena ensocietiĝo. Sendube, la universitata diplomo signifas novajn kaj promesdonajn vojojn en la profesia kampo. Estiĝas tamen kelkaj

demandoj. Ĉu diplomitiĝo, per si mem, garantias ensocietiĝon? Ĉu la konoj akiritaj en la universitata supera kurso difinas la bonan profesiplenumon? Ĉu la individuo kun diplomo, nur pro tio, kapablas esprimi kaj apliki la akiritajn konojn?

Por plibone analizi tiajn rimarkindajn demandojn, ni atentu la vortojn de la ĉefgvidanto de LBV, en lia libro *Urĝas reeduki!*^{*3} “(...) **Efika preparo:**

^{*3} *Urĝas reeduki!* — Furorajo de la verkisto Paiva Netto, jam disvendigis pli ol 230 mil ekzempleroj. La verko aperas ankaŭ en la retkatalogo de Eldonejo Elevação sekve de partnereco kun Submarino Digital/Gato Sabido.



School Picture

“Trafa Edukado liberigas. Kaj kun Ekumena Spiritualeco, ĝi sublimigas.”

Paiva Netto

La Spirito havas distingan lokon en nia laboro. Tamen, dum edukado de junuloj kaj plenaĝuloj por la memsubteno en ĉi tiu materia mondo de teknologio neniam antaŭe vidata — kaj paradokse nuntempe tiel nestabila al tiuj laborantaj por propra estonteco —, ni devas plej alte konsideri tion ke la edukatoj bezonas esti efike preparitaj por la prema postulo de nuntempa labormerkato. Kaj plie: per tia maniero ke ili ne laŭiru vojon en kiu la profesio, por kiu ili sin preparis, malaperu fine de la kurso. Estas esence do ke ili ricevu efikan formadon por ke ili estu aŭdacaj, entreprenemaj, tiel ke ili povu superi la postajn okazaĵojn kiuj, en iu ajn momento, defias la socion, timigante popolamasojn. (...) Neniom efikos do — se tiel argumenti —, aŭdacaj planoj, se ne estos iu konvene instruita por disvolvi ilin”.

La instruisto de la lernejoj de Legio de Bona Volo zorgas pri la defia realaĵo de la 21a jarcento kaj tial li prilaboras la konajn aspektojn kunligitajn al la Ekumena Spiritualeco. Tiamaniere difiniĝas plej bonkvalita pedagogia enteno, esenca por la pli novaj profesioj, preparante la lernantojn por kreskantaj defioj. Konscia pri la valoroj etikaj, ekumenaj kaj spiritaj kiuj konsistigas la konceptajn fundamentojn de la pedagogio aplikata en lernoĉambro, la edukisto plifortigas la lertecojn kaj kompetentecojn de la edukatoj. Tiel, ĝojigas nin la agado de dediĉaj profesiuloj, kiuj vidas sin mem kiel kunaŭtoroj por konstruo de Solidara, Altruisma, Ekumena Socio, unu el la ekzisto-kialoj de Legio de Bona Volo. Certe ĉi tiu jarmilo dankas. ●

Superado

Favoratoj de
LBV fariĝas
protagonistoj de
sia vivo

Kvankam en la lasta jardeko Latinameriko registris ciferojn pli pozitivajn en la kampo de Edukado, daŭre urĝas la strebo por instruado kun bonkvaliteco kaj ties plivastigo. La problemoj rilatiĝas al nesufiĉa instruhoraro, lernejoj aparataroj teknologie eksmodaj, alta indico de antaŭtempa forlaso de lernejo kaj malkongruo inter aĝo kaj klaso/lernoĵaro.

Tiuj temoj spegulis malbonaĵojn kiuj ankoraŭ malhelpas la edukan sistemon, kaj farigas ĝin neefika, neinkluziviga, ĉar ĝi senigas infanojn, venintajn el malriĉaj familioj, je aliro al bonkvalita edukado. Tial, jam de la 1980-a jardeko Legio de Bona Volo komencis krei gravajn spacojn por instruado kaj civitaneco pere de starigo de lernejoj kaj Komunumaj Centroj de Sociala Asistado ne nur en Brazilo, sed ankaŭ alilande. Dum tiuj pli ol tridek jaroj, la socieduka laboro de LBV plivastiĝis per memstaraj bazoj en Paragvajo (1984), Argentino kaj Urugvajo (1985), Usono kaj Bolivio (1986) kaj Portugalio (1989).



Ni prezentos sekve historiojn pri superado de personoj, kiuj kredis sin senperspektivaj kaj tamen konstruis plibonan estontecon danke al la solidara agado de la Institucio. Ni montras ankaŭ kiamaniere la Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de la Ekumena Civitano, de jardekoj sukcese aplikataj de la Institucio, estas pozitive akceptataj de edukistoj kaj gepatroj.

— ARGENTINO —

Solidareco kiu venkas barojn

En lernoĉambro por infanoj ĝis 4-jaraj, de la lernejo de Legio de Bona Volo en Bonaero, la etulo **Álvaro Huallpa Castro** estis la plej interesata studi. Iam, dum leciono de legokapabligo, la raporto-skipo de BONA VOLO havis agrablan surprizon: la knabo skribis sian nomon je la unua fojo.

Álvaro venis al LBV en 2007, dujaraĝa. Post malmulte da tempo, la neordinara konduto de la knabo vekis la atenton de profesiuloj de la Institucio. *“Li ne havis la lingvon disvolvita, ne sciis rilatiĝi aŭ ludi kun aliaj infanoj, aspektis tre malsocietema, ne komprenis*

la demandojn kaj ofte montriĝis timema”, rakontas la edukisto **Alejandro Puchetta**.

La gepatroj, **Nicolás** kaj **Celia**, estis informitaj de la teamo de psikopedagogiistoj de LBV pri la malfacilaĵoj de la filo rilate lernadon kaj kunvivadon. Helpe de la familio, la lernejo havigis kuracadon inkluzivantan psikologiiston, logopediiston kaj hospitalan helpkuraciston. *“Ni komencis la laboron per la rilato inter li kaj la proksimulo, kiel rigardi en la okulojn (ĉar li flankenŝovis la rigardon), ĝis veni al la disvolvo de la lingvo”*, klarigis la edukisto.

Álvaro kaj la patrino, Celia. Danke al la partopreno de la familio kaj al la apogo de LBV, la knabo venkis la malfacilaĵojn pri lingvo kaj interrilato.



Fotoj: Persona arkivo

Pro la terapio, Álvaro progresis. Li komencis komunikiĝi kaj lia lernokapablo baldaŭ pliboniĝis danke al partopreno kaj dediĉo de ĉiuj: gepatroj, edukistoj, kuracistoj kaj la knabo mem, kiu multe festis kun la lernokamaradoj la unuan vorton skribitan.

En 2009, Álvaro finis la studojn en la porinfana lernejo de LBV. Malgraŭ la progreso atingita, la familio Huallpa trovis malfacilaĵojn por registri lin en normala lernejo pro lia perturbo rilate atenton kaj parolon. Tial, laŭ peto de la gepatroj, LBV intervenis kaj la knabo estis akceptita en iu registara eduka centro. Nuntempe, 7-jaraĝa, li vizitas la unuan lernojaron de la baza lernejo kaj ankoraŭ havas akompanon de profesiuloj de la Institucio, kiu tenas rektan kontakton kun la direktoraro de la nova lernejo.

Por la gepatroj, kiuj ne havus kondiĉojn pagi tuttagan lernejon kaj bonkvalitan kuracistan flegon, LBV redonis la esperon je plibona estonteco. *“Li estas nia ĝojo kaj igas nin pli kunigitaj. Ĉefe nun kiam ni estas superantaj lian problemon”*, diris la patrino.

La Pedagogio de LBV promocias la Homon laŭ integra maniero.

Tiel, multaj infanoj kaj junuloj havas oportunon por lernado, antaŭe nealirebla.



Fotoj: Arkivo BV



Alveninte en Argentinon, en 1985, LBV koncentris siajn agadojn en iu manĝejo, kiu havigis helpon kaj nutraĵon al familioj de la gastejo Warnes. En 1990 estis inaŭgurita la Infanlernejo Jesuo (nuntempe funkcia en areo da 1.530m²), kie oni senpage ofertas kompletan edukadon kaj manĝo-subtenon.

En la sama loko, ekde 2001, disvolviĝas la programoj LBV — *Infano: Estonteco en la Estanteco!* kaj *Baza kuirado kaj vivokvalito*. Alia grava iniciato estas la *Rondo de Ludiloj*, en la Infana Hospitalo Pedro de Elizalde. En 2007 ekfunkciis la *Cirkulanta Lernejo*, kun edukaj aktivadoj por infanoj loĝantaj sur stratoj. Pliajn informojn ĉe www.lbv.org.ar.

BOLIVIO

Estonteco kiel eble plej bona

Apenaŭ alveninte en Bolivion, antaŭ du jardekoj, la brazilano **Elizabeth Veríssimo Mac Lean** trovis realaĵon pli malriĉan ol tiu kiun ŝi estis familiariĝinta kaj ŝi decidis helpi familiojn de tiu lando, kiu iĝis ŝia nova hejmo. Akompanis ŝin, iuj rememoroj kaj granda volo fari la diferencon. *“La vero estu dirata, mi faras multon ĉi tie”*, ŝi fieras.

Same kiel Elizabeth, LBV naskiĝis en Brazilo kaj plivastigis la agadon de Solidareco en aliaj landoj. *“La ĉeesto de tiu Organizo en Brazilo ĉiam estis signifa, mi bone memoras. (...) Ĝi estas*

laboro tre grava, kaj tial mi min dediĉis al ĝi”, ŝi pravigas.

En Bolivio, kie pli ol duono de la popolo vivas en malriĉeco (laŭ studo de Organizo de la Iberamerikaj Ŝtatoj por Edukado, Scienco kaj Kulturo, 2006), la volontulino konatiĝis kun multaj rakontoj de superado. Unu el ili rilatas al la iama lernanto **Luis Aguilar**, kiu eniris en LBV-on de La-Pazo, kiam li estis dujaraĝa. Lia historio similis al tiu de multaj boliviaj infanoj, kies familio vivas sub grandaj malfacilaĵoj. Koncerne al Luis, lia patrino estis senlabora, ĉar ŝi ne havis lokon por lasi la filon, kaj la patro laboris farante brikojn el argilo. Sen sufiĉa laborpago, la familio trovis en la Institucio la necesan apogon por strebi al plibona vivo. *“Nia situacio ne*



► La bolivia junulo Luis Aguilar, kiam helpata de LBV (reliefe en la apuda foto), kune kun aliaj anoj de la grupo Jach'a Malku (la dua de maldekstre).



estis bona; ni havis malmultajn rimedojn. Estas tio, kion mi memoras. Sed, dum mi restis en LBV nenio mankis al mi. Ĝi estis tre grava en mia vivo: la unuaj paŝoj, la studo, la respondeco. Mi lernis valorojn”, rakontis la iama lernanto.

Nuntempe, 25-jara, la junulo laboras kiel muzikisto, post studoj en la Nacia Konservatorio pri Muziko de Bolivio. Li ludas andan fluton (quena) en la tradicia grupo de folkloro muziko Jach’a Mallku, kun kiu li sin prezentis en Kanado, Usono, en la tuta Latinameriko, en Hispanio kaj Italio. Li estas dankema al la oportuno, kiun oni havigis al li: *“Mi ricevis bonan edukadon. Kiam mi eliris de LBV, mi rekte iris al la unua lernejo. Mi eĉ ne bezonis viziti la antaŭlernejojn. Mi havis nenian problemon, ĉar mi jam estis preparita, jam sciis multajn aferojn”.*

Kunlerneĵano de Aguilar kaj iama lernantino de LBV, **Fidelia Rojas Salazar**, ankaŭ 25-jara, rememoras kun estimo la infanecon en la Institucio: *“Mi multe lernis ĉi tie. Eldiris miajn unuajn vortojn; lernis fidi je mi kaj sekvi antaŭen. Mi dankas pro la tuta apogo, kiam ni pleje bezonis”.* Ankaŭ



Fidelia Rojas

pliaj tri fratoj de Fidelia estis favorataj, kio permesis al la patrino trovi laboron kaj plibonigi la enspezon de la familio.

El tio kion ŝi lernis en la Infanvartejo Jesuo, la junulino konservis speciale valorojn kaj riĉajn instruojn por la vivo. *“Estas grave havi estimon al la profesio, kuraĝon kaj multe da respondeco”*, kompletigas nun la helpo-flegistino.



Fotoj: Leila Tonin



En La-Pazo, ekde 1986, LBV subtenis infanvartejojn celantan infanojn en socia vundebleco. En 1994, la laboro ampleksiĝis kaj ekfunkciis la Infanvartejo Jesuo, kiu nuntempe gastigas pli ol 90 infanojn inter 2 kaj 5 jaroj. Danke al la apogo de la bolivia popolo, estis kreita la Centro por Teknika Kapabligo kaj la Centro por Alfabetigo, kun la celo instrui legadon kaj skribadon, sed ankaŭ oferi teknikojn kaj aliajn rimedojn por profesiigo al gepatroj, kiuj ne havis oportunon viziti lernejojn. En la lando, ĉirkaŭ unu miliono da personoj (aŭ 10% de la popolo, laŭ informoj de la Popolnombro 2001) ne havas aliron al edukado. Pliajn informojn ĉe www.lbv.org.bo.

BRAZILO

Formado de honestaj homoj

“LBV malfermis la pordojn al mi, kiam mi plej bezonis (...), LBV ĉiam ĉeestis.”

Eliana Lannes de Oliveira

Patrino de kvar eksgelelernantoj de lernejo de LBV en Rio-de-Ĵanejro/RJ.

Por la dommastrino **Eliana Lannes de Oliveira**, paroli pri Legio de Bona Volo ĉiam venigas bonajn rememorojn kaj vekas dankemon. Emocie ŝi kaj la gefiloj **Igor Lannes Gregório**, **Beatriz Lannes Santos** kaj la ĝemeloj **Álton Lannes de Oliveira** kaj **Aguilar Alves Celestino Jr.**, akceptis la skipon de BONA VOLO.

La du pli aĝaj filoj, la 21-jaraj ĝemeloj Álton kaj Aguilar, konservas bonajn rememorojn pri tiu epoko dum kiu ili partoprenis en diversaj aktivecoj realigataj en la Eduka Centro de LBV de Rio-de-Ĵanejro, inkluzive de la Ekumena Infana Koruso


de Bona Volo. Kiel lernantoj de la unua klaso, kiuj kompletigis la komencajn ciklojn de la fundamenta instruiteco en tiu lernejo, ili havis la okazon regali per muzika prezento la ĉefgvidanton de la Institucio, okaze de lia vizito al la loko. “*Ni kantis la muzikon Amikoj por ĉiam por la Frato Paiva, en iu tago kiun mi neniam forgesos. Li emociiĝis kaj ankaŭ ni, ĉar li vidis ke ni estas bone zorgataj kaj feliĉaj tie*”, memoras Aguilar, nuntempe soldato de la Brazila Aerarmeo.

La tenereco de la direktoro-prezidanto de LBV markis tiujn knabajn korojn kaj konserviĝas en rememoroj de formitaj homoj. “*Li estas nia dua patro, ĉiam zorgema pri nia estonteco, pri tio ĉu ni ricevas preparon por esti bonaj homoj kaj havi bonegan edukadon*”, kompletigis Álton, kiu laboras pri estrado de personaro

en banka entrepreno de Rio-de-Ĵanejro, Brazilo.

El la sennombraj piedpilkaj partioj, ludataj en la plursportejo

Aguilar (maldekstre) kaj Álton (meze kun la brazila flago).





► Aguilar, nuntempe, kiel soldato en la Aerarmeo.



Fotoj: Lucian Fagundes

de la eduka konstruaĵo, kaj el la agrabla tempo de lernado restis tiu certeco por la ĝemeloj: la plej bonkvalita edukado. *“La lernejo de LBV instruis nin havi bonan prudenton en la vivo, respekti la instruistojn, la kunlernejanojn, pri la graveco de unuiĝo kaj danki al Dio pro ĉio. Ni havis instruistojn bone kvalifikitaj, kiuj edukis nin serioze”,* rememoras Aguilar.

S-ino Eliana enskribigis la ĝemelojn en la lernejo de LBV tuj post ĝia inaŭguro, en 1996. Laŭ ŝi, multaj estis la petoj por iu loko, pro la infrastrukturo, organizado kaj oportuneco por ke la gepatroj lasu la gefilojn dum la tuta lerneja periodo. *“Mi estas tre feliĉa partopreni en tiu 15 jaroj da historio de la Eduka Centro”,* ŝi diris.

Tiu dommastrino emociiĝas parolante pri la malfacilaj momentoj kaj pri kiel la familio sukcesis superi ilin. *“Mi multe bezonis la lernejon, ĉar tiutempe mia patrino malsaniĝis kaj mi devis zorgi pri ŝi. Dum iom da tempo mi restis sen laboro, malfacila situacio, sed ĉar ili restis tie la tutan*



tagon, ili revenis hejmen puraj kaj nutritaj. Mi ne maltrankviliĝis pri dentisto, ĉar tie estis en la lernejo; okaze de iu ventrodoloro aŭ iu alia afero, ili povus viziti la kuraciston de la lernejo, kaj la instruistinoj informis min pri tio kio estis farita. Ĉio tio por mi estis malpeziĝo”.

Poste, ankaŭ Igor kaj Beatriz enskribiĝis en la edukejo de LBV. Tiam, s-ino Eliana jam sciis kion signifas tiu spaco por ŝia familio: *“Ĝi estas la dua hejmo de niaj gefiloj. Ĉiuj funkciuloj havas estimon al la infanoj; tio estas sekureco por ni.*

▼ FAMILIA PORTRETO —

De maldekstre: Igor, Aguilar, Áliton, la patrino Eliana kaj Beatriz. Ĉiuj trovis en LBV la necesan subtenon por la plena civitaneco.

Medio de Paco kaj civitaneco

La pedagogia propono de LBV ekfamiĝas ankaŭ en usonaj lernejoj, laŭmezure kiel pli kaj pli da edukistoj komencas uzi ĝin en lernoĉambro.

Inter ili troviĝas la laboro de la juna instruistino de Infanvartejo, **Mariana Malaman**, el Novjzerzejo. Kun la libro *Urĝas reeduki!* enmane, ŝi citas la aŭtoron mem de la verko, la ĵurnaliston kaj verkiston **Paiva Netto**, por klarigi la atingiĝojn ĉe la lernantoj per praktiko de tiu lernado: *“La amo, kiu inspiras nian pedagogian vojon, se oni prenas ĝin laŭ plej alta senco, estas ne nur alta sento de Animo, sed politika strategio, same komprenata kiel plej alta inklino, kon-*

forme al Socia Justeco, kiel ia strategio por postvivado por individuoj, popoloj, nacioj”.

Surbaze de la eduka modelo proponata de Paiva Netto — en kiu *“Cerbo kaj Koro”*, intelekto kaj sento, kune laboras cele eduki la Kompletan Estulon, la Ekumenan Civitanon —, la edukistino disvolvas aktivecojn kiuj stimulas la infanon pripensi la konsekvencojn de siaj agoj kaj senti empatian al siaj kunlernejoj. *“Mi laboras kun aĝuloj inter 4 kaj 5 jaroj kaj jam vidas kondukajn problemojn, diversajn manierojn de ĉikanado. Tial mi decidis uzi kelkajn teknikojn de la Pedagogio de Amo por analizi kaj instigi malpliĝajn lernantojn pripensi.”* Kaj ŝi plu diris: *“Por helpi ilin regi la motivojn kiuj estigas iujn kondutojn, havigante al ili la okazon pensi pri ili, anstataŭ igi ilin atendi la juĝon de la instruisto. Kaj ĉiuj ofte demandas: ‘Ĉu mi bone kondukis hodiaŭ?’, kio montras ke ili jam bone konscias pri tio kio estas korekta kaj kio estas erara”.*

La Pedagogio de Amo prilaboras moralajn valorojn laŭ vidpunkto de la Ekumena Spiritualeco, stimulante al Solidareco, kiel montras la instruistino Mariana, kaj la rezultoj transiras la pordegojn de la lernejo. **Susana**



► La 5-jara Evan dum aktivado de la Pedagogio de Amo, sukcese aplikata de usonaj instruistoj.

Marques, patrino de **Evan**, 5-jara, diris ke ŝi estas ne nur kontenta pri tiu eduka metodo, sed ŝi ankaŭ defendas ĝian uzon en la tuta instrusistemo. *“Mi sentas ke la Pedagogio de Amo estas bonega kaj speciala maniero igi la lernantojn pripensi kaj analizi la ĉiutagan konduton. Mi observis signifan ŝanĝon en la konduto de mia filo”*, ŝi substrekis.

Ĉe la profesiuloj pri Edukado, kiuj uzas la pedagogian metodon de LBV, estas la komuna opinio pri tio ke eduki kun Ekumena Spiritualeco estas ensence, ĉar ekde frua aĝo la zorgo rilatas preskaŭ ekskluzive al la kona rego. *“Okaze de kunvenoj de gepatroj kaj instruistoj, multfoje mi aŭdas demandojn kiajn ‘ĉu mia filo lernos legi antaŭ ol li fariĝos 5-jara?’ aŭ ‘kion mi povas fari nun por ke li vizitu prestiĝan universitaton poste?’*. Infanoj ne devas esti premataj, ili meritas ĝui trankvilan infanecon por esplori la mondon ĉirkaŭe, apud personoj kaj medioj, kiuj instruas ilin fariĝi bonaj civitanoj. Post tio, ili estos pretaj por lerni solvi problemojn pri matematiko, kompleksaj ekvacioj, ĥemio, fiziko, geografio”, diris Mariana Malaman.

Laŭ la opinio de la instruistino, per aldono de la distingaĵo de la Ekumena Spiritualeco al Edukado, *“la infano havas sian memestimon plibonigita, scias ke ĝi estas eksterordinara, laŭ sia maniero, povas esti kreema, solidara kaj estas etike kaj morale konscia”*. El tio, kompletigas Mariana, venas la sento pri *“respekto al la gepatroj, instruistoj kaj kunlernejanoj, kaj tiamaniere la infano komprenas la diversecon ĉirkaŭantan ĝin kaj ĝi akceptas tiujn malsamecojn kiel ion, kio valorigos ĝin”*.



Fotoj: Arkivo BV



Ekde 1986, la usona LBV (Legion of Good Will – LGW) funkciigas Oficejon de Reprezentiĝo por Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko kaj Komunuman Centron en Newark (Novjerzejo). Tie disvolviĝas programoj en la fakoj socia, eduka kaj sana, kiuj kontribuas por la evoluo kaj plibonigo de la vivokvalito de miloj da malriĉaj familioj kaj personoj.

La brazilanino **Luise Keepler**, volontulino en la Komunuma Centro de LGW, diras ke ŝi ĉiam emociiĝas, kiam ŝi memoras la tutan strebon kaj dediĉon de la Institucio en ĝia solidara agado. *“De multaj jaroj mi estas atestanto de tiu strebo, de tiu batalo. Kaj mi estas atestanto de tiu beno. (...) Estas granda feliĉo esti nun ĉi tie; mi volas daŭrigi en tiu mirinda laboro de karitato al la proksimulo.”* Pliajn informojn ĉe www.legionofgoodwill.org.

PARAGVAJO

En la ĝusta horo, la subteno.

Dum 15 jaroj da geedzeco, la paragvaja paro **Nancy Martinez** kaj **Rafael Zubasqui** alfrontis multajn financajn problemojn, ĉefe post la naskiĝo de la unua filo, **Elias Javier**, nuntempe 8-jara. Pro la malfacila situacio, la familio transloĝigis al la domo de la bopatrino kaj Nancy devis forlasi la laboron por zorgi pri la filo.

La malfacilaĵoj ŝajnis ne finiĝi, sed la situacio ŝanĝiĝis. *“Iun tagon, mia najbarino parolis pri iu institucio al kiu ŝi kunlaboras kaj kiu povos helpi min”*, rakontas Nancy. Tiel, ŝi fidis

al LBV la zorgojn pri sia filo, tiam 2-jara. *“Tio tute aliĝis mian vivon. Mi sukcesis laboron kaj ni baldaŭ povis transloĝiĝi al propra domo. Krom la kvalito de la lernejo, mia filo lernis pri la graveco preĝi kaj kundividi”*, fiere diris la patrino.

Elias finis la antaŭlernejon, sed plu vizitis la Institucion: nuntempe li estas helpata de la programo *Edukado, Sporto kaj Vivo!*, en kiu li ĉeestas lecionojn pri plastikaj artoj kaj futbalo.

Ankaŭ la malpli aĝa fratino, **Ruth Camila**, 5-jara, estis akceptita de LBV. Laŭ la patrino, en tiu medio, la knabino



▶ La geparo Nancy Martinez kaj Rafael Zubasqui kune kun la gefiloj: Elias Javier, 8-jara, kaj Ruth Camila, 5-jara. Reliefe, la etulino en lernoĉambro de la Infanĝardeno kaj Antaŭlernejo José de Paiva Netto, en Asunciono, Paragvajo.

Fotoj: Alison Beilo

sentas sin hejme. “LBV estas kiel hejmo, kie oni trovas Amon kaj tenerecon, kie oni edukas kaj instruas la infanojn esti bonaj societanoj.”

La patro kunĝuas je tiu sama kontentigo. “Estas ĝojige ke troviĝas en Paragvajo institucio, kiu ne nur edukas infanojn, sed helpas kaj estas zorgemaj pri la tuta familio. Mi estas tre, tre multe dankema. Ke Jesuo ĉiam akompanu ĉiujn kiuj partoprenas en tiu granda Organizo.”



Fotoj: Arkivo LBV

Allison Belo



Antaŭ ol konatiĝi kun LBV, la familio **Benedita Ramírez** kunpremiĝis en malgranda ĉambro kaj ne ĉiuj gefiloj — **Andrea Sánchez**, 14-jara; **Víctor Manuel**, 11-jara; **Lucas Manuel**, 9-jara; kaj **Matias Ezequiel**, 5-jara — povis frekventi lernejon. Danke al la Instituto, la tri malpli aĝaj gefiloj registriĝis en LBV, kaj tiamaniere la patrino povis labori kiel domservistino kaj helpi la edzon, dungita en laboratorio, plibonigi la familian enspezigon. Pro tiu apogo, ili sukcesis aĉeti terenon kaj konstrui la propran domon, kun kvin ĉambroj kaj libera korto. “Tio kio okazis en nia vivo estas beno. Mi dankas al ĉiuj vi pro la subteno por ke mia familio antaŭenigu. Ni ne sukcesus alveni ĉi tien solaj”, diras Benita.



Post Brazilo, Paragvajo estis la unua lando favorata de la aktivadoj de LBV, en 1984. Krom en la ĉefurbo Asunciono, oni efektivas iniciatojn celantajn edukadon kaj reduktion de malriĉeco ankaŭ en la departementoj de Paraguari kaj Alto Paraná, ĉefe en Quiindy kaj Urbo del’Oriente. Indas reliefigi la Infanvartejon kaj Antaŭlernejon José de Paiva Netto (kun kompleta edukado por infanoj de 2 ĝis 6 jaroj), la programon LBV — *Infano: Estonteco en la Estanteco!* kaj la agadojn celantajn profesiigon de gejunuloj kaj la zorgojn kaj ensocietiĝon de maljunuloj. Pliajn informojn ĉe www.lbv.org.py.

PORTUGALIO

Volontulado kaj Ekumena Civitaneco

De 22 jaroj Legio de Bona Volo de Portugalio laboras diskonigante Solidarecon pere de sociedukaj agadoj kaj de homa kaj spirita helpo. La laboro de la tiea Institucio atingas edukejojn, apogas samcelajn organizaĵojn kaj plivastiĝas pere de simpozioj, kulturaj ekspozicioj, porsanaj eventoj ktp.

Ĉiuj tiuj iniciatoj helpas firmigi la koncepton pri Ekumena Civitaneco, ĉar apoge de la teamo de profesiuloj kaj volontuloj de LBV, la favorato sentas sin kuraĝigita ŝanĝi sian vivon pere de pozitivaj teniĝoj, bazitaj sur la plena ekzerco de la spirita, homa kaj socia solidareco.

Ĉiumonate, pli ol 400 volontuloj agadas en sociedukaj programoj de LBV — ekzemple, en la fako pri buŝhigieno, pere de la programo

Feliça Rideto; kolektante nutraĵojn per la programo *Unu Paŝo Antaŭen*; en la organizado de ricevitaj donaĵoj, en la spacoj mem de la Institucio, kiel tiu por Aktivadoj en Libera Tempo (portugale ATL); kaj okaze de fratecaj vizitoj petitaj de familio.

En ĝia tasko akompani la favoratojn, kio inkluzivas aktivadojn por motivigo kaj valorigo de la Vivo, kolektiĝas multaj historioj pri persona superado kaj de amo al la proksimulo. Ili okazas tiel ĉe tiuj kiuj estas favorataj per la solidaraĵoj, kiel ĉe tiuj kiuj volontulas en LBV, ĉar iniciatoj kaj bonaj agoj ŝanĝas ankaŭ la vivon de tiu kiu helpas la Institucion. Kiel la ekzemplo de la emeritino **Rosa Orquídea Ferreira**, kiu de 18 jaroj volontulas en la urbo Porto. *“Mia sperto ĉi tie estas bonega. Ĝi instruis min sindoni, esti humila,*



Foto: Aravo BV



► La emeritino Rosa Orquídea Ferreira diras ke la volontula aktivado en LBV estas instruriĉa: *“Post mia alveno, mi neniam plu volis eliri”*.

ami la aliulojn kaj esence plenumi la Novan Ordonon de Jesuo, nome 'Vi amu unu alian, kiel Mi vin amis'.”

Laŭmezure kiel disvastiĝas pliaj tiaj homaj historioj, kreskas la ĝojo de la teamoj de LBV, kaj ankaŭ la certeco pri tio ke ilia laboro faris la diferencon. *“Mi konatiĝis kun LBV en momento tre komplika de mia vivo. Mi venis pere de amikino kaj, post mia alveno, neniam plu mi volis eliri!”*. Tiuj personoj proksimaj al la voluntulino Rosa, laŭ ŝi, perceptis ŝanĝojn en ŝia agmaniero. *“Ili perceptis multajn ŝanĝojn... mi komencis esti persono multe pli komprenema, facile interrilatiĝanta; nun mi sukcesas superi miajn problemojn kun pli da fido kaj persisto.”*

La portugalia LBV nuntempe havas ĉirkaŭ 3 mil personojn registritajn en sia centro pri volontulado. Ĉiujare venas pli da personoj pretaj ŝanĝi multajn vivojn al plibona sorto. Tiuj personoj estas akceptataj por lerni labori kiel voluntulo, en la urbo Porto. Ĉiuj ricevas informojn pri la sociedukaj programoj, la celoj, la misio kaj la koncepto de la Instituto.

“Mia sperto ĉi tie estas bonega. Ĝi instruis min sindoni, esti humila, ami la aliulojn.”

Rosa Orquídea Ferreira

Volontulino de LBV de Portugalio



Fotoj: Arkivo BV



En Portugalio, Legio de Bona Volo komencis sian laboron en la urbo Porto, en 1989. Danke al la helpo de la portugalia popolo, tiu laboro ne haltis kreski kaj tial pli kaj pli da personoj estas favorataj de ĝia solidara agado. Krom en Porto — kie ĝi komencis agadi en pli granda konstruaĵo en 2010, kio plivastigas la lokajn asistojn —, LBV agadas en Lisbono, Koimbro kaj Brago, inkluzive starigante tutlandajn kampanjojn, kun distingo por la programoj *Feliĉa Rideto*, *Unu Paŝo Antaŭen*, *Semo Bona Volo* kaj *Sporto estas Vivo*. Pliajn informojn ĉe www.lbv.pt.

URUGVAJO

Lernejo-modelo de LBV

Promocii bonan edukadon de infanoj, adoleskantoj, junuloj kaj plenaĝuloj estas unu el la misioj de Legio de Bona Volo, kio kongruas kun la dua el la ok Jarmilaj Evoluigaj Celoj, starigitaj de UN: atingi universalan elementan edukadon.

Antaŭ tiu celo, la Eduka Instituto de LBV en Montevideo, ĉefurbo de Urugvajo, fariĝis motivo de granda kontentigo por multaj helpatoj, venintaj el komunumoj malpli favorataj.

Provizita per vastaj ĉambroj, bone lumigitaj kaj aerumitaj, la lernejo-modelo de LBV helpas infanojn en medio konvena al ilia kompleta disvolviĝo, ĉar tie oni prilaboras la aspektojn fizikan, movan, socian kaj spiritan. Per

tio, plivigliĝas la agado de la familio, inkluzivita parto de la Pedagogio de Ekumena Civitano.

Ĉio en la loko estis elpensita laŭ la regionaj apartaĵoj, surbaze de la necesoj de la favoratoj kaj de spertoj de la urugvajaj profesiuloj. En la dua etaĝo de la konstruaĵo, ekzemple, estis kreita granda areo por ludaj kaj sportaj aktivecoj, kaj ankaŭ por gastigi seminariojn kaj eventojn, kiuj celas la formadon kaj kapabligon de junuloj kaj plenaĝuloj. En la teretaĝo, kreiĝis spaco speciale dediĉita al majunuloj. Ankoraŭ en tiu etaĝo, troviĝas vasta manĝejo, ludilejo, ŝirmita sportludejo kaj dentista kaj kuracista kliniko.

Iama lernantino de la Institucio,



Arquivo BV



Béttina Lopez

► Daniela González dum unu el la kulturaj aranĝoj de la Eduka Instituto de LBV en Montevideo, Urugvajo. Apude, dum freŝdata vizito, akompane de lernantoj de la lernejo de la Institucio.

Daniela García González 17-jara. Kiam ŝi parolas pri la iama lernejo, ŝi ridetas kaj la voĉo vigliĝas. *“Mi havis bonegajn instruistinojn, kiuj laboras tie ĝis nun. Mi lernis multajn aferojn. Kiam mi eliris, mi multe sopiris. Nun, mi sentas min kapabla plu studi, kaj mi scias ke plej multon el tio mi ŝuldas al Legio de Bona Volo, danke al la apogo kaj fidon, kiujn ili ĉiam havigis al mi”*, diras la junulino, kiu gajnis stipendion por viziti kurson pri Grafika Desegno.

La patrino de Daniela, **Sandra González**, rakontas: *“Mi edukis sola miajn tri filinojn kaj, por sukcesi tion, mi laboradis la tutan tagon. Mi bezonis iun lokon, kiu povus zorgi pri mia filino, tiam 3-jara, ĉar ŝiaj fratinoj vizitis la lernejon. Danke al Dio, mi trovis la Infanvartejon Jesuo, de LBV. Mia tuta vivo ne estus sufiĉa por danki tiun solidarecon, la bonajn principojn, resume, la agon helpi la familiojn, por ke niaj gefiloj kresku kun valoroj, respekto al la proksimulo kaj al si mem. (...) Mia filino rememoras pri LBV ĉiam kun granda tenereco”*.

“Danke al Dio, mi trovis la Infanvartejon Jesuo, de LBV. Mia tuta vivo ne estus sufiĉa por danki tiun solidarecon.”

Sandra González

Patrino de iama lernantino de la lernejo de LBV



Fotoj: Arkivo BV



De 25 jaroj, en Montevideo, la urugvaja LBV gastigas unu el la lernejoj-modelo de la Instituto, inaŭgurita en 2007, kie funkcias ankaŭ la Infanvartejo Jesuo. 1.500 personoj estas helpataj tie. Inter la aktivecoj kaj programoj disvolvataj elstarigas LBV — *Infano: Estonteco en la Estanteco!* kaj la kuracista konsultejo partnere kun la enlanda Ministerio pri Sano. Pliajn informojn ĉe www.lbv.org.uy.

Edukado por



Reproduktor: Cida Linares

“Estimata s-ro José de Paiva Netto, mi transdonas al vi miajn preĝojn por ĉiuj. Benoj de Dio estu ĉe vi en Legio de Bona Volo, kaj multaj homoj ekkonu la Amon de Jesuo pere de Monda Parlamento de la Ekumena Frateco de LBV kaj konservu vivanta la Bonan Mesaĝon de Lia Amo en la mondo, amante unuj la aliajn, same kiel Li amis nin. Dio vin benu.”

Patrino Tereza de Kalkuto (1910-1997)

Nobel-premiito pri Paco (1979), per letero sendita al LBV en 1994 okaze de inaŭguro de la Monda Parlamento de Ekumena Frateco.

“Mi sentas grandan feliĉon kaj honoron pro la omaĝo farita de ParlaMundi de Legio de Bona Volo.”

Nelson Mandela

Nobel-premiito pri Paco en 1993, konsiderata kiel unu el la plej elstaraj personecoj en la XX-a jarcento, kaj estis omaĝita en la kategorio *Hors-Concours*, per la Medalo de Merita Ordeno de Ekumena Frateco, en 1997.



Reproduktor/AE



Aktivo BV

“Mi dankas la afablan inviton por la inaŭguro de tiu ĉi monumento al Paco, la Templo de Bona Volo. Al mi tre plaĉis la distingon. Mi transdonas miajn sincerajn bondezirojn kaj mi esperas, ke LBV ĝuu grandan sukceson en tiu granda evento (...).”

Jimmy Carter

lom antaŭ la inaŭguro de la Templo de Bona Volo, la eksa prezidento de Usono kaj Nobel-premiito pri Paco en 2002 manifestis per korespondaĵo sian admiron pri la entreprenado.

nova mondo

Lucian Fagundes



Desmond Tutu, eĉ antaŭ ol li ekveturis Brazilon — laŭ raporto de la ĵurnalo *Correio Braziliense*, en la Federacia Distrikto, en majo 1987 —, deklaris al diplomato el Itamaraty, la Ministrejo pri Eksteraj Rilatoj de Brazilo: “Post mia alveno en via lando, mi volas renkontiĝi kun miaj kredfratoj kaj revidi du grandajn amikojn: Dom

Hélder Câmara kaj la prezidanto de Legio de Bona Volo, José de Paiva Netto”. En la sama jaro, kiam li parolis al reprezentantoj de LBV, li asertis: “Mi volas laŭdi la mondan prezidanton de Legio de Bona Volo pro lia artikolo ‘*Apartheid* tie kaj [*apartheid*] ĉi tie’ (publikigita en la 30-a de marto 1986 en la ĵurnalo *Folha de S.Paulo*), per kiu li klopodas konsciigi popolojn, ke ekzistas pluraj tipoj de rasismo en multaj mondopartoj, eĉ en Brazilo. (...) Mi ŝatus transdoni mian grandan dankon pro lia agado. Dio benu lin kaj la estimatajn Legianojn de Bona Volo. Vi ĉiuj fariĝis, laŭlonge de via fruktodona agado, estimataj laboristoj de Dio (...)”. En 2006, jaro en kiu la ĉefgvidanto de LBV memorfestis la Oran Jubileon da laboro en la Organizaĵo, la anglikana ĉefepiskopo registris: “Dum tiuj 50 jaroj Dio potence uzadis Paivan Netton. Ke Li povu beni kaj fortigi lin por ke li daŭrigu la dian laboron en la mondo, pro Amo al la Filoj de Dio”.

Desmond Tutu

Anglikana ĉefepiskopo kaj Nobel-premiito pri Paco en 1984

Krom la parolo de sep Nobel-premiitoj pri Paco, kiun la kara leganto trovos en ĉi tiuj paĝoj, enestas ankaŭ la opinio de edukistoj, eminentuloj, artistoj, sportistoj kaj religiestroj pri la laboro realigata de Legio de Bona Volo kaj de ĝia direktoro-prezidanto sur la eduka kampo. Ili utilas kiel kuraĝigo al ĉiuj kiuj kredas je la forto de Bona Volo kiel elemento de transformiĝo kaj bazo por la daŭripova evoluigo de la planedo.

Cilberto Bertolin



“La projekto de LBV estas fakte unika, konkreta, kreema, ĝi kunvenigas ĉiujn, kiuj volas Pacon, trankvilecon por religioj, por etnaj grupoj. Per ĝi, Legio de Bona Volo akceptas flankenmetitajn knabojn kaj donas al ili loĝejon, amon, Edukadon. Fine, ĝi estas eksterordinara programo, kiu devas inspiri registarojn kaj organizojn alilandajn fari la samon. Kulturo de Paco, de toleremo kaj de kunvivado inter etnaj grupoj kondukas al vera, daŭra paco kaj al socia progreso. (...) Mi emociiĝas pro ĉi tiu okazo viziti LBV-on. Mi estas profunde ravita pro ĉi tiu oportuna okazo vidi tiom da artesprimoj, spiritaj valoroj, alvoko al Paco, al konsento inter la popoloj, inter la nacioj. Mi pensas, ke estus utile kaj bone, se militantaj landoj venus ĉi tien (al Templo de Bona Volo) kaj pripensadus por konstati la malutilecon de siaj konfliktoj. Ekzistas en la mondo tiom da belaĵoj homaj kaj spiritaj, kiujn oni detruas. Kaj la Templo de Legio de Bona Volo estas fakte unika. Mi pensas, ke la plej grava aspekto de la Institucio, en ĉi tiu projekto, en ĉi tiu arkitekturaĵo, estas la spirito de etna, kultura, religia frateco, en kiu ne ekzistas sociaj, ekonomiaj malsamecoj. Ĉi tie, ĉio reprezentiga, ĉiuj povas dialogi. Fakte, ĝi estas ege interesa.”

D-ro José Ramos Horta

Prezidento de Orienta Timoro kaj Nobel-premiito pri Paco en 1996, okaze de vizito al Legio de Bona Volo en Brazilo.

J. A. Parmegiani



“Estas mirinde paroli pri la Templo de Bona Volo kaj pri la Monda Parlamento de la Ekumena Frateco de LBV. Ili reprezentas tion kion mi ĉiam kredis, nome ke la homoj kaj ĉiuj religioj havas la saman kapablon helpi la Homaron. Ĉiuj ili kunportas ene de si la mesaĝon pri kompatato, Amo kaj pardono spiritala. Tio kion Legio de Bona Volo faras estas mirinda. Mi plene apogas tiun laboron kaj esperas, ke mia Spirito kaj Animo povos esti ĉiam ĉe vi.”

Dalai-Lamao Tenzin Gyatso

Tibeta religiestro, kiu ricevis Nobel-premion pri Paco en 1989, kaj la Medalo de Merita Ordeno de Ekumena Frateco de ParlaMundi de LBV en 1999, en la kategorio *Hors-Concours*.

“La estimo, Amo kaj dediĉo de LBV al tiuj infanoj igas nin kredi ke por Brazilo kaj por la mondo estas solvo, ke eblas forigi mizeron, analfabetecon, absolutan malriĉecon. Mi komencas ankaŭ disvastigi la laboron faritan de la kunuloj de LBV. (...) Mi ne scias ĉu tiuj estas legianoj, ĉu partianoj... Mi scias nur ke tiu Instituto entuziasmigas iun ajn Homon... Tial, mi eliras de ĉi tie ravita pri la laboro farita de vi ĉiuj. Mi eliras de LBV kun la certeco pri tio ke la vorto Solidareco ankoraŭ povas esti unu el la ŝlosilvortoj por ke ni restarigu nian Brazilon kaj aliigu ĝin al lando pli justa kaj frateca, al lando kie la personoj vivu kun multe pli da Amo. (...) Legio de Bona Volo estas modelo de vivo.”



Diskonigo/ABR

Luiz Inácio Lula da Silva

Iama prezidento de Brazilo okaze de vizito al la lernejo de LBV, en la ĉefurbo San-Paŭlo, la 14an de septembro 1995.

Arkivo BV



“Mi rekonis, eble post pluraj jaroj da donacado, helpante al LBV, kio estas farita el la mono, kiun mi donacis; mi sentis tre grandan ĝojon. La valorigo de

infanoj prilaborita ene de la familioj. Kiu havos la okazon, tiu venu koni, valorigi, iom lerni pri Edukado; temas pri laboro bone kondukata, kun kiu valoras la penon konatiĝi.”

Edgar Lagus

Vicdirektoro de la Komisiono pri Homaj Rajtoj de B'nai B'rith (Idoj de la Alianco, en la hebrea) en Brazilo, okaze de vizito al la Instituto pri Edukado de LBV en San-Paŭlo/SP, la 18an de majo 2011.

“Renkontoj kiaj tiaj estas tre oportunaj por tio kion LBV deziras rilate Justecon, Pacon kaj Respekton. Tial ni kontribuas al tio ke, se Dio volos, konstruigos socion multe pli klera, multe pli pacema, multe pli klera pere de la dialogo.”



Daniel Trevisan

Šejko Jihad Hammadeh

Vicprezidanto de la Monda Asembleo de la Islama Junularo, post partopreno en la Monda Forumo Spirito kaj Scienco, de LBV, en 2004.

Arĥivo BV



“La problemoj, kiujn la socio alfrontas nuntempe en la tuta mondo, estas preskaŭ la samaj. Se la gvidantoj de tiuj landoj povus veni ĉi tien, en LBV, kaj vidi kion ĝi realigas, ili ŝanĝus la mondan realaĵon. Kiam mi vizitis la Templon de Bona Volo, en Brazilja, mi sentis ian povan spiritualecon. En LBV, mi vidas ĝin aganta, kiel io alirebla al tiaj infanoj kaj eble ankoraŭ pli forte pro ĝiaj fruktoj.”

John Amos

Usona aktoro, decembre 1999.

“Ni estas vere impresitaj pri tio kion Legio de Bona Volo faras por tiuj infanoj. Brazilo bezonas tian laboron, kiun Legio de Bona Volo disvolvas. (...) La ĉi-tieaj infanoj estas gajaj kaj ili bezonas tiun gajecon kaj tiun Amemon. LBV helpas infanojn aliĝi al grandaj homoj en la mondo.”

Liao Qiping

La tiama ĝenerala konsulo de Ĉinio en San-Paŭlo, okaze de vizito al LBV, septembre 1996.



Marina Figueredo

Persona arkivo



“Grava estas tiu alternativo de LBV kun sia tuta instrupropono celanta la senhavulojn, speciale la komunuman infanan edukadon. (...) La zorgo de LBV estas tiu pri bonkvaliteco, afero eksterordinare bone elpensita. (...) Cetere, ĉiu didaktiko pri edukado de infanoj nur povas esti kreema, se ludado enestas ĝin. La infano de Legio de Bona Volo esprimiĝas, parolas, pensas kaj sin realigas ankaŭ ludante. **LBV havigas al malriĉulo bonkvalitan opcion. Ĝi ne havigas malriĉan opcion al malriĉulo.** Nuntempe Legio de Bona Volo estas nacia havaĵo, ĝi havas longan historion.” [Dikaj literoj estas niaj.]

Pedro Demo

Sociologiisto, emerita profesoro de la Departamento pri Sociologio en la Universitato de Brazilja (UnB) kaj iama prezidanto de la Monda Organizo por Antaŭlerneja Edukado, dum konatiĝo kun la laboro de LBV en 1996.

“Amo kaj komprenemo estas tre gravaj por ebligi, ke infanoj vivu pli feliĉe kaj povu koncentriĝi en aferojn, kiuj signifas por ili antaŭeniron. Ricevinte amon, infano sentas kuraĝiĝon, eklernas ami kaj tiel estigas kondiĉojn por ia etoso de Paco por ĉiuj. Organizoj de la civila socio estas esence gravaj kunlaborantoj por ke oni atingu egalecon inter seksoj. Tial, mi gratulas LBV-on pro la sukceso rekte agi defende de la Virino.”



Ardiana Rocha

D-rino Asha-Rose Migiro

Ĝenerala vicsekretariino de UN (surfote kune kun **Amanda Vieira**, Soldateto de Dio, kiel estas nomataj la infanoj en Legio de Bona Volo), okaze de la 51a sesio de la Komisiono pri la Statuso de Virinoj, en 2007.

Leila Marco



“José de Paiva Netto, mi bone scias kia estas via laboro, ĉar ankaŭ mi jam delonge laboradas por la bonfarto de infano en nia lando, kontraŭ infandeliktado, ekde la filmo (1979) *Os Trombadinhas* (Poŝoŝtelisto). Mi scias, ke temas pri granda laboro. Ke Dio plifortigu vian sanon! Ke la tuta anaro de Legio de Bola Volo povu, per komuna strebado, konkeri spiritajn bonfarojn kaj havigi traviveblan estontecon al la infanoj asistataj en la lernejoj de LBV tra la tuta Brazilo.”

Pelé

Sportisto de la Jarcento kaj omaĝito per la Medalo de Merita Ordeno de la Ekumena Frateco de ParlaMundi de LBV, en 1996, en la kategorio *Sporto*.

“Rilate Edukadon, la strebo de LBV estas rimarkinda. (...) Paiva Netto estas portanto de nova metodologio kiu bezonas fakajn instruistojn ne disponeblaj en la merkato kaj tial ili devos sin prepari laŭ sistemigo originala kaj revolucia el la vidpunkto de pedagogio.”

Arnaldo Niskier

Senmortulo de la Brazila Akademio pri Beletro kaj prezidanto de la Centro por Integriĝo Entrepreno-Lernejo en Rio-de-Janeiro (CIEE-RJ), dum konatiĝo kun la pedagogia propono de LBV en 1995.



Vivian R. Ferreira

Lelia Marco



“Mi vere ŝatis vidi, antaŭ ĉio, la arkitekturon de la Templo de LBV; mi tre admiris ĝin, kaj kompreneble mi estas solidara al ĝia ekumena propono favore al Paco, favore al la unuiĝo de la homa specio. Tiuj estas valoroj, kiujn ankaŭ mi aspiras. (...) Ĝia filozofio estas tiu de kompreniĝo inter ĉiuj, do for de ĉiaj dogmoj, kio por mi sonas tre agrable. Kiel Paiva Netto sukcesas realigi tiom da gravaj verkoj? (...) Legio de la Homoj de Bona Volo estas unu el plej gravaj neregistaraj organizoj kun reprezentiĝo en UN. (...) En mondo tiel malcerta kia tia en kiu ni vivas nuntempe, kun tiom da malfacilaĵoj, kun tiom da malriĉeco, (...) efektive mankas tio ke la Homoj de Bona Volo man-en-mane laboru por Paco, Frateco, Solidareco inter la popoloj, nepre memoru pri tio ke estas riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj necesas defendi la malriĉajn.”

D-ro Mário Soares

lama prezidento kaj iama ĉefministro de Portugalio. Li ricevis la Medalon de Merita Ordeno de Ekumena Frateco de ParlaMundi de LBV, en 1996, en la kategorio *Hors-Concours*.

Daniel Trevisan



“Estimata s-ro Paiva Netto, mi ŝatus gratuli vin kaj Legion de Bona Volo. (...) Mi aparte plu impresiĝas pro via profunda sindevontigo pri la enkonduko de la Jarmilaj Evoluigaj Celoj kaj pro la streboj entreprenataj de vi kaj via skipo, sub via lerta superrigardo, por enkonduki en la kampon de Edukado konkretajn iniciatojn partnere kun aliaj sektoroj de la civila socio, inkluzive de la privata sektoro. Mi estas treege ravita, ĉar per la eventoj, kiujn vi organizis kaj per la streboj de via Institucio, mi vidis la plifortigon de kohera strukturo kaj programo por daŭra evoluigo, por kapablo kaj por laborreto fokusanta edukadon kaj precipe tiujn lokojn, kie infanoj ankoraŭ suferas pro malriĉeco kaj malsato. Mi sentas ke ni nepre bezonas tiajn organizojn kia LBV, laboranta en konsultaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj.”

Michele Billant-Fedoroff

Tiama adjunkta estrino de la Sekcio de NRO-j ĉe la Departemento pri Ekonomiaj kaj Sociaj Aferoj de UN, per mesaĝo skribita al la ĉefgvidanto de LBV, la 27an de marto 2007.


“Mi kredas ke LBV estas vere kontribuinta al la plifortigo de tiu komunumo. Mi lernis ke la eduka sistemo aplikata ĉi tie ne celas nur instruadon de Matematiko aŭ Portugallingvo, sed ankaŭ civitanecon. Ne nur la infanoj estas favorataj per tiu eduka sistemo de LBV, sed ankaŭ iliaj gepatroj kaj familianoj.”

D-ro Joop Theunissen

Dum oficiala misio por UN en Rio-de-Ĵanejro, Brazilo, cele al partopreno en la 6a Intersektora Forumo Reto Solidara Socio — 3a Foiro pri Novigoj de LBV, marte 2009.



Vivian R. Ferreira



Lucian Fagundes

“Ĉeesti la Templon de Bona Volo estas tre emociige kaj ankaŭ grave, ĉar vi agadas favore al

la popolo. Kaj mi pensas, ke ĉio celas konsciigon de junuloj, por ke ili estu preparataj. Kaj kune kun io tre grava: Spiritualeco. (...) Mi volas saluti Paiva Netto pro liaj 50 jaroj de kuraĝo kaj laboro favore al la Bono de la Homaro kaj de la popoloj. Fratan solidaran gratulbrakumon kaj ke li daŭrigu sian iradon estigante Esperon kaj Solidarecon ĉe la homoj.”

Adolfo Pérez Esquivel

Argentina verkisto kaj Nobel-premiito pri Paco en 1980, dum intervjuo je la februaro 2006.

“Estas bele vidi la filozofion de Legio de Bona Volo, kiu prilaboras la Kulturon de Paco ĉe la infanoj ekde frua tempo. Tia Edukado estigos estontecon multe pli bonan por la Homaro. Okazas tiom da teruraj aferoj en la mondo... Tial estas mirinde

vidi lokon kiel ĉi tiu, en Rio-de-Ĵanejro, meze inter kvar faveloj, kiu havigas esperon al tiaj komunumoj, kaj helpas la infanojn kaj iliajn familianojn, la personojn kun kiuj ili interlitiĝas, tiel ke ili povas entuziasmiĝi kaj, sekve, havi la eblecon ĝui mondon multe pli pozitivan. LBV efektive plenumas la Jarmilajn Evoluigajn Celojn starigitajn de UN, ĉar ili sidas sur du bazoj, kiuj estas, unue la homaj rajtoj, kiujn LBV metas en praktikon, laŭ mia konstato; kaj la dua estas Paco. Ne estas evoluo sen Paco en la medio. Mi kredas ke ĉiuj neregistaraj organizoj dediĉataj al tiu fundamenta laboro kun Spiritualeco meritas aplaŭdojn.”



Diskonggo

Leslie Wright

Reprezentanto de la Internacia Fondaĵo Virginia Gildersleeve ĉe Unuiĝintaj Nacioj, okaze de vizito al la Eduka Centro de LBV en Rio-de-Ĵanejro, marte 2004.



Eduarda Pereira

Meze, Anna Mwashu, el Tanzanio, akompane de Rosana Bertolin (maldekstre) kaj Maria de Albuquerque, de LBV.

“LBV faras mirindan laboron [per la Pedagogio de Amo kaj Pedagogio de la Ekumena Civitano], precipe por certigi ke infanoj ricevu altkvalitan kaj altvaloran Edukadon. Tiuj estas neordinaraj valoroj, kiuj disvolvas iliajn Cerbon kaj Koron. En estonta tempo, tiuj infanoj grave influos en la socio, komplete ŝanĝos ĝin kaj starigos Pacon ĉie. Tio tre emociigis min. En plej evoluintaj landoj, oni multe parolas pri plibonigo de Edukado, sed mi komprenas ke Legio de Bona Volo batalas precipe por formi la karakteron de infanoj per valoroj kiel Amo, kaj trankviligi ilin, konsciigi ilin. Edukado bazita sur tiaj valoroj povas tute ŝanĝi socion, igi la homojn vivi en paco kaj tiel plibonigi la tutan mondon. (...)

Mi ŝatus, ke LBV vizitus nin, tial ke ni povu enkonduki tian edukan metodon por la infanoj en Tanzanio. (...) **Tiu marko [la emblemo de LBV en formo de blua koro] multon signifas, ĉar ĝi signifas Amon; ĝi estas tutmonda simbolo. Kaj se oni havas Amon, tiam Paco ĉeestas, evoluo ĉeestos; pro tiaj etaj aferoj oni povos spirite, kaj eĉ klerige, esti solidara kun aliaj homoj. Do, eĉ se oni havas malmultajn rimedojn, se oni havas Amon, tiam eblas esti solidara kaj alporti evoluon al multaj homoj”.**

Anna Mwashu

Direktorino por Elradikigo de Malriĉeco kaj Ekonomia Socipovigo de la Ministrejo pri Ekonomia Planado en Tanzanio, okaze de intervjuo en julio 2007.

“Fakte mi laŭdas kaj dankas en nomo de la Homaro al LBV. Efektive tiu helpo al plej malfortaj al plej mariĉaj estas nobla laboro, ĉar homo ne edukita ne estas homo. Tiu laboro eble estas la plej grava, kiun faras LBV, kaj mi vere ĝin gratulas.”

Roman Dobrzyński

Ĵurnalisto kaj dokumentfilma reĝisoro. Vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio (1989-1992), dum vizito al la Instituto pri Edukado de LBV en decembro 2006.



Vivian R. Ferreira

VOCÊ QUER OS CARROS
MAIS PREMIADOS DO BRASIL?
VOCÊ QUER UM
Honda!



O Pós-venda Honda foi eleito pela 6ª vez consecutiva o melhor do Brasil. Pode confiar!



Consórcio Nacional Honda prestações a partir de **R\$ 793,35***

Agende um test drive

TODOS OS MODELOS COM ATÉ 5 ANOS DE GARANTIA TOTAL!



RIO TÓKIO - BOTAFOGO
Rua General Severiano, 201
21 **2122-4999**
www.riotokio.com.br

RIO TÓKIO - RECREIO
Avenida das Américas, 14.001
21 **2323-9000**
www.riotokio.com.br

NARITA - BARRA
Avenida das Américas, 2001
21 **3987-8888**
www.hondanarita.com.br

A garantia estendida de 5 anos é opcional e possui um custo adicional de R\$ 1.850,00. *O valor de R\$ 793,35 refere-se a 75% da carta de crédito para aquisição do New Fit LX 1.4 Flex 101cv, câmbio manual, ano 2011/2011, com valor de R\$ 41.178,75. Reservamo-nos o direito de corrigir possíveis erros de digitação. Fotos meramente ilustrativas.

RESPEITE A SINALIZAÇÃO DE TRÂNSITO





Vizitu LBV-on de Novjorko kaj vidu kiamaniere tiun gravan idealon viviĝas en la Granda Pomo!

Ni kredas, ke ekzistas solvo por la mondaj problemoj:

Bona Volo

Eksciu kiel oni praktikas ĉi tiun proponon, kaj per kiu maniero vi povas helpi.



LBV



LGW

BRAZIL Centra Sidejo: Rua Sérgio Tomás, 740
• Bom Retiro • San-Paŭlo • CEP 01131-010 • Tel.:
(+5511) 3225-4500 • www.lbv.org
• www.bonavolo.com

USONO 36 W 44th Street Mezzanine (inter la 5a kaj la 6a Avenuoj) • Manhattan • Novjorko • 10036 •
Tel. (+1646) 398-7128 • www.legionofgoodwill.org
• www.facebook.com/legionofgoodwill